

Esperanto *Internacia*

Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo

Vol. 3. N-ro 4

Aprilo 1939

Komuna Kantlibro

Redaktita de H. W. kaj N. HOLMES



LA ĈIE-BEZONATA LIBRETO

kun

VORTOJ KAJ MUZIKO

de

33 KANTOJ

64 paĝoj. Prezo 1 ŝ. 2 p. afrankite, aŭ 5 internaciaj respondkuponoj.



Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY Ltd., ANGLUJO

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo.

Norda Literaturo

KOLEKTO DE LITERATURAJ VERKOJ EL NORDA EŬROPO

Redaktita de T. INDRA

Vol. 1. 84 paĝoj. 1 ŝ. 2 p., aŭ 5 internaciaj respondkuponoj.

Vol. 2. 80 paĝoj. 1 ŝ. 2 p., aŭ 5 internaciaj respondkuponoj.

MENDU [^]CE

Internacia Esperanto-Ligo

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

D-ro LEOPOLD DREHER, L. K.

■ ■

Supera kurso de Esperanto

Dua eldono

Prezo : 1 ŝ. 6 p. aŭ 6 internaciaj respondkuponoj.

MENDU [^]CE

Internacia Esperanto-Ligo

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

Esperanto Internacia

Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG,
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederl.

Vol. 3. N-ro 4

Aprilo 1939



CLARK GABLE KAJ NORMA SHEARER TOSTAS LA ESPERANTO-MOVADON

Dum la filmigo de « Idiot's Delight » la du famegaj filmsteloj de M.G.M. multe interesiĝis pri la neŭtrala internacia lingvo kaj pri ĝia granda valoro por la moderna mondo.

JOSEPH R. SCHERER, Prez. de EANA :

Esperanto en grava filmo

2000 leteroj kaj poŝtkartoj alvenis ĉe Reĝisoro Brown

Okuloj kredas pli rapide ol oreloj !

(Verkita por ĉiuj Esperantaj gazetoj kiuj deziras uzi la enhavon.)

Reĝisoro Clarence Brown miregis pro tiom da leteroj, kiuj alvenis jam dum la filmigo de « Idiota Amuzo ». 2000 leteroj el ĉiuj mondpartoj!

Mi ankaŭ miregis! Ne pro la granda nombro de la leteroj, sed pro tio ke tuta milo de la leteroj venis el Nederlando!!! Certe ne 50 % el ĉiuj esperantistoj loĝas en tiu ĉarma lando.

Sed mi venis al la konkludo ke almenaŭ du landaj esperantistaj organizaĵoj, en Nederlando, estas tiel bone organizitaj kaj gvidataj, ke la membroj grandioze kuniaboras. La mil leteroj el Nederlando venis preskaŭ ĉiuj de la membroj de a Federacio de Laboristaj Esperantistoj kaj de « La Estonto Estas Nia » (LEEN).

Mi nepre devas gratuli al ambaŭ organizaĵoj kaj danki al la membroj kiuj skribis. Same mi kompreneble dankas al la disaj gesamideanoj en aliaj landoj, kiuj jam sekvis la inviton sendi gratulojn al s-ro Brown. Mi preferas ne diri, kiom de la aliaj mil leteroj venis el la diversaj landoj, ĉar mi timas ke kelkaj samideanoj hontus.

Permesu al mi jam en la komenco diri ke la leteroj kun longa listo da subskriboj faris la plej grandan impreson. La sola subskribo de prezidanto aŭ sekretario de granda societo ne efikis tiel okulfrape, kiel 20 aŭ 100 subskriboj (kiuj parte eĉ kovris la dorsan flankon) sur letero de malgranda klubo. Do mi rekomendas tiun metodon plej forte. Poste ĉiuj membroj povas unuope sendi apartan poŝtkarton aŭ letereton.

Preskaŭ ĉiuj skribintoj, laŭ mia antaŭa rekomendo, gratulis pro la uzo de Esperanto, kaj promesis viziti la kinejojn por vidi tiun filmon. Kromaj promesoj vizitigi

siajn familianojn kaj geamikojn kaj fari gazetan reklamon same bone impresis.

S-ro Brown montris la leterojn al aliaj reĝisoroj kaj rakontis pri la evidenta grandeco de la esperantista movado. Ĉiuj miris ke Esperanto vivas en tiom da landoj. Oni ofte suspektas (kelkfoje ne sen kialo) ke ni fanfaronas pri la hodiaŭa utilo de Esperanto. Do ni devas montri faktojn... precipe en Hollywood! **Okuloj kredas pli rapide ol oreloj!** Mi ne povas tion ripeti sufiĉe ofte.

La amaso de leteroj kreis **pli grandan respekton por Esperanto** ĉe la estroj de la M.G.M. filmfarejo. Do ili pli volonte aŭskultis kiam mi postulis kelkajn ŝanĝojn en la dialogo por eviti neintencitan domaĝon al Esperanto.

Pro la kreita pli granda respekto por Esperanto (dank' al tiuj gratulamasoj) mi povis pli facile zorgi ke Esperanto estu uzata nur en digna maniero.

Do ĉiu skribinto povas havi la kontentigan senton ke per sia letero aŭ karto li helpis al mi kaj al Esperanto en la malproksima Hollywood.

La multaj belaj foto-poŝtkartoj iras al la kolosa bild-kolekto de la M.G.M. filmfarejo, en kiu oni povas admiri centmilojn da interesaj vidindaĵoj de la tuta mondo. Per la bela donaco mi povis krome gajni por Esperanto la amikecon de la grava bibliotekestro de M.G.M.

★

Mi diris en pli frua artikolo ke Reĝisoro Brown konsentis respondi la gratuleterojn persone. Sed kiam alvenis leteroj amase ĉiutage el preskaŭ 100 landoj, li petis ke mi klarigu al la esperantistoj ke li ne kapablos persone respondi. Li supozis ke venos 100 aŭ eble 200 leteroj. Sed DU MIL! Neeblaĵo!

La tempo de s-ro Brown estas tro multtekosta kaj ne permesas al li respondi milojn da leteroj. Lia salajro estas proksimume \$100.— por ĉiu horo aŭ \$5,000.— ĉiusemajne. Ĝi estas konforma al lia mirinda kapablo krei grandfilmojn kiuj ĉiam alportas belajn profitojn al M.G.M.

Se pro viaj talento kaj arto vi kapablus krei pentraĵojn aŭ libron tiel mirindan ke centmilionoj da homoj volas vidi aŭ legi ĝin, ĉu vi ne volus ricevi parton de ia profito? Sendube jes!

La filmfarejo mem respondos kaj parte jam respondis per mallonga esperantlingva letero. Tiaj amasleteroj estas kutime respondataj nur post kelkaj monatoj.

Bedaŭrinde la adresoj de multaj skribintoj estas nelegeblaj. Ili kompreneble ne povas ricevi respondon. Adresoj kaj nomoj kompreneble devus ĉiam esti skribitaj per klaraj pres-literoj.

★

Strangaj petoj venis de kelkaj gesamideanoj. Iuj volis tuj-tuj veni al Hollywood. Kelkaj sendis fotografajojn de siaj familianoj, aŭ de siaj favorataj hundoj kaj katoj.

Kelkaj samideanoj skribis 3-5-10-paĝajn leterojn kun babilado pri la tuta familio aŭ pri la glora historio de siaj patrolandoj. Aliaj rakontis kiom da lernejoj estas en la lando, kiom da poetoj, ŝafoj, aŭ kiom da bibliotekoj. Filmreĝisoro ne havas tempon por legi kiom da rozoj aŭ florbrasikoj kreskas tie en fora lando.

Kelkajn leterojn mi devis preni hejmen kaj kaŝi por eviti malbonan impreson pri la esperantistoj.

Mi petis ke oni sendu gratulojn pro la uzo de Esperanto kaj promesu fari vastan reklamon por la filmo. Sed oni ne diru en tiaj leteroj ke oni skribas «laŭ la peto de s-ro Scherer». Leteroj devas esti spontaneaj.

Bedaŭrinde kelkaj gesamideanoj «informis» s-ron Brown ke pro la filmo Esperanto multe profitos. **Kial diri tion?** M.G.M. tion jam suspektis. Sed M.G.M. ne uzis Esperanton por fari propagandon por Esperanto!

Feliĉe 90 % de la skribintoj **ĝuste diris**

ke pro la uzo de Esperanto la filmo profitos, ĉar la esperantistoj de la mondo faros reklamon tre vastan por la filmo. **Ili saĝe diris ke Esperanto helpas al la filmo**, laŭ teknika vidpunkto kaj certigante por ĝi pli grandan financon sukceson. **Tion** la filmfarejo ŝatas aŭdi.

(Pli poste ni povos skribi ke ni vidis la filmon kaj ke ĝi tre plaĉis precipe pro la Esperantaj dialogopartoj.)

Ne fanfaronu pri la filmo en leteroj kaj ĉe geamikoj!

Ne parolu pri «Esperanto-filmo»! Prefere parolu pri «Gable-Shearer filmo kun Esperantaj dialogopartoj». Ankaŭ ne postulu ke tuj ĉiuj filmoj parolu Esperanton ekskluzive!

★


Bedaŭrinde mi ne povas korespondi private kun gesamideanoj kiuj petis tion. Mi estas prezidanto kaj vic-prezidanto de tro multaj Esperantaj organizaĵoj por havi tempon por korespondi pri io speciala. Mi ankaŭ deziras legi kelkajn Esperantajn librojn, iom labori en la Lingva Komitato, kaj verki kelkajn artikolojn en diversaj lingvoj. Mi ankaŭ bezonas iom da tempo, se mi volas esti bona varbgarantianta en 1939. Kaj... en mia libera tempo mi ja ankaŭ devas labori por gajni iom da mono por vivi.

Se iuj inteligentaj gesamideanoj inter la aĝoj 20 kaj 30 volas korespondi kun kelkaj el miaj tute novaj gelernantoj en malgranda klaso de filmgeaktoroj, ili povas sendi al mi simplajn poŝtkartojn kun koncizaj informoj pri si (aŭtobiografio sur p.k.). Mi ne povas garantiĝi respondon al ĉiuj, se alvenos tro multaj kartoj. Vi devas riski tion. Mia nuna adreso: 212 S. Grand, Los Angeles, (Calif.)

Tamen mi ĝojas ricevi leterojn kaj salutojn kun informoj kaj kritikoj. Ili donas al mi ideojn. Mi povas ilin respondi en venontaj artikoloj. Sed mi nepre ne povas persone respondi.

Mi deziras tute sincere danki al la eldonantoj de esperantistaj gazetoj kiuj sendis al mi ekzemplerojn de la numeroj kiuj enhavas menciojn pri la nova «Gable-Shearer Film». Tute specialan dankon al samideano Mickey pro lia artikolo

Nia propagando, nia vivo, kaj nia estonteco



De maldekstre : 1. Propaganda tabulo fiksita ĉe la en'pordego de la ejo de l'Esperantista Societo « Verda Stelo » en Osijek (Jugoslavio). Ĝi konstante okulfrapas la preterirantojn, tiom pli, ĉar ĝi troviĝas ĉe la fronto de l' plej trafikplena strato de la urbo. La tabulo estas pentrita en kvin koloroj kaj surhavas kroatlingvan alvokon kiu signifas jenon : « Lernu la internacian helplingvon ! Esperanto instruas la homojn reciproke sin kompreni, estimi kaj helpi. » (Foto : L. Firiczky.) — 2. Jen kvazaŭ la praktika apliko de la ĵus legita alvoko : Germanaj gesinjoroj Karl Simon kun edzino, gvidataj de loka samideano s-ro Radomir Klajić (maldekstre) tra Beogrado, la ĉefurbo jagoŝlavia. — 3. La gitaro estas tiel granda kiel Colette, la 4-jara filino de la IEL-delegito en Perpignan (Francujo), s-ro René Llech-Walter. Sur la bildeto, Colette estas vestita kiel la anoj de la « Estudiantina Catalana » ; Colette multe amas muzikon kaj fervore lernas Esperanton.

en n-ro 51 de « Franca Esperantisto ». Viajn demandojn mi dume jam respondis en depostaj artikoloj en « Heroldo » kaj en sekvonta pri « kiel venigi la filmon al via urbo ».

Tre efikan laboron faras ankaŭ la Brita Esperanto-Asocio. Espereble la britoj mem raportis aŭ -os en « Heroldo » kio: ili eltrovis pri la montrado de la filmo en Eŭropo.

Mi jam klarigis ke mi preparas 3-4 kolektojn kun eltondaĵoj el Esperantaj kaj nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Koran dankon pro jam senditaj ekzempleroj ! Sed mi esperas pri kelkaj mil pliaj eltondaĵoj. La kolektoj estos unu por Reĝisoro Brown, unu por M.G.M., kaj unu por mi mem.

Mi sukcesis transdoni salutojn de diversaj gesamideanoj al kelkaj filmsteloj, nome al Robert Taylor, Sonja Henie, Joan Crawford, Spencer Tracy, Johnny Weissmuller (Tarzan), Janet MacDonald, Wallace Beery, Charles Boyer, Mickey Rooney, Paul Muni, Luise Rainer, Loretta Young, Hedy Lamarr, Norma Shearer, Clark Gable kaj kelkaj aliaj. Ili dankas pro la salutoj kaj siaflanke salutas la koncernajn admirantojn.

★

Permesu al mi ankoraŭ kore danki al diversaj aŭtoroj pro senditaj lernolibroj kaj aliaj verkaĵoj. Hazarde mi estas kolektanto de Esperantaj lernolibroj el kiel eble plej multaj landoj.

Esperanto-Kongresoj | 1939

Internaciaj :

31-a Universala Kongreso de Esperanto, Bern (Svislando), 29.7.-5.8 Adreso : 31-a Universala Kongreso de Esperanto, Bern, Svislando.

21-a Kongreso de Internacia Katolika Unuigo Esperantista (IKUE), Antwerpen (Belgujo), 5.-11.8. Adreso : 21-a Kongreso de IKUE, Potgieterstraat 1, Antwerpen, Belgujo.

19-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Köbenhavn (Danlando), 5.-10.8. Adreso : K-do Paul Neergaard, Gothersgade 158, Köbenhavn K., Danlando.

Naciaj kaj aliaj :

28-a Belga Esperanto-Kongreso, Leuven (Louvain), 27.-29.5. Adreso : 28-a Belga Esperanto-Kongreso, Hotel Ratteman, Leuven, Belgujo.

30-a Brita Esperanto-Kongreso, Weston-super-Mare, 26.-29.5. Adreso : S-ro Lionel H. May, 288 The Boulevard, Weston-super-Mare, Somerset, Anglujo.

24-a Kongreso de Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la teritorio de la nederlanda lingvo (FLE), Arnhem, dum pasko. Adreso : P. Rosseel, Spijkerstraat 295, Arnhem, Nederlando.

10-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista, Antwerpen, 27.-29.5. Adreso : Loka Kongresa Komitato de la X-a, Stefanestraat, 44, Antwerpen, Belgujo.

2-a Nordfranca Kongreso de Esperanto, Fresnes-sur-Escaut, 13.-14.5. Adreso : S-ro Ninauve, 75, rue Emile Zola, Fresnes-sur-Escaut, Nord, Francujo.

27-a Japana Esperanto-Kongreso, Osaka, 29.-30.4.

12-a Jugoslavia Kongreso de Esperanto, Karlovac, 28.-29.5. Adreso : Esperanta klubo, Haulikova 7, Karlovac, Jugoslavio.

Jubilea Kongreso de Litova Esperantistaro, Kaunas, 17.-19.6. Adreso : Litova Esperanto-Asocio, Zemaičiu 15, Kaunas, Litovio.

11-a Nederlanda Esperanto-Kongreso (LEEN), Rotterdam, 8.-10.4. Adreso : C. Baksteen, Willem Buytewechstr. 225 c. Rotterdam, Nederlando.

11-a NEDERLANDA ESPERANTO-KONGRESO.

Ĝi okazos pasken, la 8.-10.4., en la fama havenurbo Rotterdam. Sabaton, je 11.30, okazos oficiala akcepto ĉe la urbestro en la urbdomo (apud Coolsingel) : en la Granda Burĝa Salono Mr. P. J. Oud, la urbestro, alparolos la kongresanojn ; s-ro W. Grolleman, prezidanto de LEEN, respondos ; orĝena muziko ; regalo per kafo, bongustajtoj ktp., dediĉata de la komunuma estraro. Samtage je 14.00 malferniĝas la kongresejo (Zoologia Ĝardeno, enirejo Diergaardelaan), kaj je 16.00 es'os oficiala malfermo de la kongreso. Pliajn detalojn petu de la sekretario de LKK. s-ro C. Baksteen, Willem Buytewechstr. 225c, Rotterdam.

★

27-a JAPANA ESPERANTO-KONGRESO EN OSAKA, 29-30 APRILO.

Osaka, en kies Publika Urba Halo (Nakanosima) okazos la kongreso, en la floranta sezono de la ĉeriza lando, estas la centro de la japana industrio, urbeo kun 3.000.000 loĝantoj. La kongreso havos lekon sub la honora prezido de la urbestro kaj de aliaj gravaj personoj de la urbo. Notinde estas ke al la kongreso estas invititaj dudek nacioj proksimaj aŭ malproksimaj, kaj la LKK preparas gvidistojn en la koncernaj lingvoj por la turistoj kiuj vizitos la landon ĉkaze de la kongreso. La LKK bonvenigas ĉiujn turistojn kaj aranĝas gvidon por ili, ne demandante, ĉu ili estas esperantistoj, ili nur venu sub gvido de esperantistoj. La preparataj lingvoj estas : angla, ĉeĥa, ĉina, franca, germana, greka, hindustana, hispana, hungara, itala, korea, malaja, manĉuka, mongola, nederlanda, persa, portugala, pola, rusa, sveda, turka kaj eventuale aliaj.

★

UNU PLIA JAPANA URBO PREPARAS GVIDLIBRON EN ESPERANTO.

Dank' al la klopodo de l' samideanoj en Kumamoto, la gvidlibro de tiu urbo kaj ĉirkaŭaj vidindaj lokoj estas nun preparata. La distrikto Kumamoto estas rimarkinda pro bela naturo kaj historiaj memoraroj, i. a. la mond-fama vulkano Aso (nacia parko) kaj insularo Amakusa fama pro antikvaj kristanaj martiroj en Japanujo. Ankaŭ la urbo Kumamoto estas notinda pro la historia loko, kie ekĝermis moderna protestanta movado en Japanujo. Do, la urbo kaj distrikto rajtas altiri la atenton de ĉiulandaj turistoj. Jam nun oni skribu, petante la gvidlibron, kaj aldonante respond-kuponon, al : Turisma Fako de Kumamoto Urba Oficejo, Kumamoto-ŝi, Japanujo.

Esperanto en la Franca Ĉambro de Deputitoj

Kiel raportite en « Heroldo de Esperanto » n-ro 7 (1012), s-ro **Boulay**, deputito de Saône-et-Loire, deponis la sekvantan tekston en la Ĉambro de Deputitoj :

Propono de rezolucio de S-ro Boulay

Voli pacon estas bone; ĝin starigi estas ankoraŭ pli bone.

Nu, estas neniu saĝa homo, kiu ne komprenas ke, inter ĉiuj eblaj rimedoj por faciligi la alproksimiĝon de la popoloj, disvastigo de komuna lingvo povas esti konsiderata kiel plej efika.

Se ĉiuj homoj povus interkompreniĝi sen interpretistoj, iliaj ĉiuspecaj rilatoj povus esti sukcesigataj laŭ nemezureblaj proporcioj; iliaj komercaj rilatoj, tiamaniere plifacilitaj, estus unu el la plej firmaj garantioj por la forigo de tiu krimo nomita « Milito ».

Ĉiuj, kiuj rilatiĝis kun alilanduloj en diversaj cirkonstancoj, scias kiom peniga kaj ridinda estas kunveno de diversnaciuloj kiuj ne povas esprimi siajn sentojn kaj klopodas sin komprenigi alie ol per gestoj kaj signoj.

Nekredeble estas ke, dum la dudeka jarcento, plej multaj el la ŝtatestroj bezonas interpretistojn, kiam ili kunvenas por provi solvado de la grandaj problemoj, kiuj interesas la vivon de iliaj respektivaj nacioj.

Utileco de « lingvo-ŝlosilo » estas klare elmontrita, tiom por la diplomataj internaciaj rilatoj, kiom por la sociaj aŭ komercaj.

Certe, deviga instruo de tia lingvo neniel povus malhelpi naciajn lingvojn en ĉiu aparta ŝtato de la homaro. Ĝi estus nur plia akiro kiu ebligas la pli bonan reciprokan interkompreniĝadon kaj sekve pli bonan konatiĝon inter la popoloj.

La ŝtato, kiu la unua tiel agus, montrus sian volon fari sian tutan teron por plibonigo de rilatoj inter la aliaj mond-partoj. Ĝi povus nur esti gratulata kaj pligrandigata pro tiu iniciato, kies valoron ĉiuj progresemaj homoj de la tuta universo sciis plene ŝati.

Tiun problemon oni povas poste meti en la tagordon de la venontaj internaciaj konferencoj, kiuj nepre estos kunvokataj sub premado de la nunaj kaj estontaj okazaĵoj.

Kiam ĉiuj homoj povos interŝanĝi siajn impresojn kaj vidpunktojn sen helpo de tradukistoj, la abomeno, kontraŭ kiu ĉiu homo inda je tiu nomo batalas, forpaŝegos malantaŭen.

Kiu volas finon, ankaŭ volas rimedojn, kaj kial ilin ne ekuzi, kiam ili estas tiom facile uzublaj senriske kaj preskaŭ senelspeze?

En tiaj kondiĉoj, mi proponas al vi, sinjoroj, alpreni la sekvantan rezolucion :

« La Deputitaro invitas la Registaron dekrete starigi la devigan instruadon de Esperanto en ĉiuj francaj publikaj lernejoj. »

★

Kompreneble, tiu depono okazis sen antaŭa interkonsento kun la Societo Franca por la Propagando de Esperanto (SEPE), ĉar ni estus petintaj s-ron Boulay, ke li bonvolu modifi sian proponon.

La Komisiono pri Instruado de la Ĉambro de Deputitoj ek-ekzamenis la proponon kaj komisiis s-ron **Voirin**, eksprofesoron en duagrada lernejo kaj deputiton de la departemento Ardennes, kiel raportonton de tiu propono.

Mi havis la 8-an de februaro kun s-ro Voirin interparoladon, kiun mi provos resumi ĉi-sube, sed mi petas miajn legantojn, ke ili bonvolu nepre konsideri la informojn donitajn ĉi tie kiel konfidencajn kaj ke ili nepre **ne** publikigu ilin en iu ajn **naĉilingva** gazeto.

La Komisiono pri Instruado de la Ĉambro de Deputitoj unuanime konsideras ke Esperanto ne devas esti instruata en la unuagrada lernejoj, ĉar, laŭ ĝi, la infanoj ricevas jam tro da diversaj instrutemoj kaj pro tio ili eĉ ne kapablas sufiĉe bone paroli nek skribi la gepatran lingvon, nek bone kalkuli.

Tamen, mi propetis de s-ro Voirin, ke li metu en sian raporton permeson instrui Esperanton je fino de la unuagrada instruo al la lernantoj, kiuj havos la « Ateston pri Lernado » kaj kiuj ne daŭrigos la studadon ĝis la duagrada instruado.

Fine s-ro Voirin konsentis pri tio kaj diris al mi, ke por la duagrada instruado li esperas ke Esperanto havos plene sian lokon.

Laŭ s-ro Voirin, la ĝenerala publiko kaj ankaŭ la esperantistoj ĝis nun ne sufiĉe serioze konsideris Esperanton, kiu, laŭ li, devus esti konsilata al la duagrada lernantoj **antaŭ** la instruado de fremd-

LA FAKTOJ

ESPERANTO EN FRANCAJ LERNEJOJ.

(Aldono al la informoj jam publikigitaj.)

Universitato de Aix :

Aix : Seminario por instruistoj. Profesoro : S-ro Boulogne.

— Unuagrada lernejo « Boulevard Notre-Dame ». Prof.: S-ro Troump.

Toulon : Unuagrada lernejo « Rouvière » Ju kursoj; la unua gvidata de S-ro Joubert kun 20 lernantoj, la dua de S-ro Gauvin kun 20 lernantoj.

— Supera lernejo por junulinoj. Profesoro : S-ro Fahrner. 27 lernantinoj.

— Knabina kolegio « boulevard de Strasbourg ». Prof.: S-ro Pauvrehomme. 8 lernantinoj 12-14 jaroj. 1 horo kaj duono ĉiusemajne.

— Knaba liceo « Boulevard de Strasbourg ». Profesoro : S-ro Baret. 4 lernantoj 13-14 jaroj dum du horoj ĉiusemajne.

Universitato de Besançon :

Lons-le-Saulnier : Seminario por instruistoj « Route de Besançon ». Profesoro : S-ro Epstein dum 2 horoj ĉiusemajne.

Universitato de Bordeaux :

Bordeaux : Liceo de Valence. Profesoro S-ro Marly. 15 lernantoj.

Universitato de Caen :

Tours : Supera lernejo « 17, rue des Ursulines ». Profesorino : S-ino Ferran, 15 lernantinoj 13-15 jaraĵ, unufoje semajne.

Universitato de Dijon :

Sens : Supera lernejo por knaboj. 3 kursoj semajne gvidataj de S-ro Galligani kun 50 lernantoj.

Universitato de Lille :

Lens : Elementa lernejo. Profesorino : F-ino Pocquet. 70 knabinoj 14 jaroj.

Universitato de Montpellier :

Armissan : Unuagrada lernejo. Profesoro: S-ro Goxes.

Prades : Knaba supera lernejo. Profesorino : F-ino Dedieu. 25 knaboj 13-14 jaraĵ.

Sète : Knaba liceo, Supera kurso (cours complémentaire). Teknika lernejo (praktika). Kursoj gvidataj de S-ro Capoulade.

Universitato de Paris :

Orléans : Liceo por knaboj. Profesoro : S-ro Delaire.

— Supera lernejo por junulinoj. Prof-ino : S-ino Guzon. 80 lernantinoj.

Versailles : Elementa lernejo. Fraŭlino Minault instruas facilajn frazojn dum promenadoj al siaj 8 jaraĵ lernantinoj. Unu el siaj koleginoj gvidas kurson kun 42 lernantinoj 10-12 jaraĵ.

— Elementa lernejo. Lernantinoj 12-14 jaraĵ, unufoje semajne po 1 h.

Universitato de Rennes :

Carhair : Elementa lernejo. Profesoro : S-ro Y. Le Gall. 50 lernantoj.

Pont-l'Abbé : Supera lernejo. Prof.: S-ro Quiniou. 75 lernantoj.

Quimper : Seminario por junulinoj. Prof.: S-ro Le Seac'h. 7 lernantinoj.

Rennes : Knabina liceo.

Universitato de Strasbourg :

Mulhouse : Knaba liceo. Profesoro : S-ro Franck Neumann, jam profesoro pri vivantaj lingvoj.

Strasbourg : Knaba liceo « Fustel de Coulange ». Profesoro : S-ro Ferez.

G. FAUCHER.

aj lingvoj. S-ro Voirin konsideras, ke malpli ol 10 % da lernantoj estas kapablaj lerni fremdan lingvon kaj kompare 100 % estas kapablaj lerni Esperanton.

Li do deziras, kaj li konkludas en tiu senco, ke la Supera Konsilantaro de Publika Instruado de Francujo komplete ŝanĝu la nunan duagradan instruadon, kiu estonte devus esti :

1. Forta, deviga instruado de la gepatra lingvo, de sciencoj kaj matematikoj.

2. Forta instruado de nur du el la sekvantaj instru-teĵoj, elektotaj laŭ la deziro de la lernantoj : Esperanto, fremdaj lingvoj, desegno, muziko, ktp.

La elektitaj instru-teĵoj de la dua parto kompreneble estus tiel funde lernigotaj, kiel tiuj de la unua, kaj ricevus

saman valoron en la ekzamenoj por la diplomoj.

Fakte, la lernantoj, en estonteco, se oni akceptos la proponon de s-ro Voirin, ricevos la samajn rekompencojn, ĉu ili lernos anglan aŭ germanan lingvon, ĉu ili lernos Esperanton.

Por ke la Supera Konsilantaro de Publika Instruado de Francujo estu bone informita pri tiuj gravaj punktoj, s-ro Voirin petis de ni multajn klarigojn, pri kiuj ni jam skribis en « Heroldo ».

Ĉiŭokaze, oni konstatas, ke pli kaj pli Esperanto estas rigardata kiel grava afero en Francujo, kaj tio estas la konsekvenco de la sukceso de la Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo ».

P. Petit.

Esperanto en Britujo

Kvankam ni ne povas fieri pri grandaj sukcesoj kiel niaj francaj geamikoj en oficialaj rondoj, aŭ pri tiom da esperantistoj kiom kelkaj aliaj tre aktivaj landoj, ni ankaŭ faras solidan kaj ageman laboron. Niaj gesamideanoj en aliaj landoj certe povis ricevi ioman ateston pri tio okaze de la 30-a U.K. en Londono.

La Brita Esperantista Asocio havas 5 salajratajn oficistojn. S-ro R. B. Wilkinson estas la ĝenerala sekretario laboranta en la oficejo kun tri stabanoj, kaj s-ro M. C. Butler okupiĝas preskaŭ ekskluzive pri propaganda laboro en edukaj rondoj, kaj el ĉiuj propagandaj laboroj en Britujo ĉi tiu certe estas la plej grava. En la aŭtomobilo, kiun posedas BEA, li vojaĝas tra la tuta lando donante prelegojn kun demonstraĵaj lecionoj en lernejoj. Dum la jaroj 1936-1938 li vizitis 413 lernejojn, kaj parolis antaŭ 53.128 infanoj kaj 2.248 geinstruistoj. Krome, dum la vizitoj li vendis 21.500 malgrandajn lernolibrojn. Ĉie li rikoltas laŭdajn aplaŭdojn pro la talenta maniero, en kiu li scias ravi la infanojn pri nia lingvo. Dum septembro 1938 li vizitis 49 lernejojn en unu sola urbo, Bristol, laŭ speciala aranĝo kun la edukaj aŭtoritatoj tie, kaj alparolis 6.500 infanojn. La vendo de libroj atingis 3.600 ekzemplerojn. Ĉi tiu laboro ne tuj rikoltas fruktojn, sed ĝi estas ne-mezureble valora pionira agado survoje al la celo: «*Esperanto en la Lernejoj*». Vigla Edukada Komitato de BEA klopodas pri tiu temo kunlabore kun s-ro Butler.

Agadon sur la ĝeneralaj kampoj atentigas speciala Propaganda Komitato, starigita proksimume antaŭ unu jaro. Ĝi respondecas pri la aperigo de monata Informbulteno por la Gazetaro, kiu estas cirkulerata al multaj ĵurnaloj tra la landoj. Sendube ĉi tio multe influis la gazetaron okaze de la Universala Kongreso, ĉar la gazetaro donis al ni vere bonegan akcepton. Pli ol 800 mencioj aperis en la gazetoj, kaj la tono estis tre favora. Mankis stultaj kaj seninformaj komentoj. Oni povas diri, ke Esperanto ne plu estas mokata en Britujo; krome, oni povas konstati, ke nia lingvo gajnas ĉiam pli simpatian agnoskon en ĉiuj rondoj.

Sekvante la modelon de la svedaj esperantistoj, BEA eldonis enkondukan korespondan kurson de Esperanto, je la kosto de unu ŝilingo. Ĝi estas anglalingva adapto de la sveda kurso, kaj jam vendiĝis pli ol mil ekzempleroj.

Parolante pri la eduka sfero oni ne preterlasu la Buchanan Esperanta Katedro en Liverpool Universitato, en la kompetentaj manoj de Prof. W.E. Collinson. Ankaŭ utila estas la Deklaracio pri la Eduka Valoro de Esperanto, subskribita de pluraj gravaj edukuloj (hablebla de BEA (kontraŭ unu respondukuponon por 10 ekz.).

Anglalingva resumraporto de la Universala Kongreso ĵus aperis, kaj ankaŭ simila resumraporto de la konferenco «*Esperanto en la Moderna Vivo*», okazinta en Parizo pentekoste 1937, kaj ties rezultoj en Francujo. Ambaŭ ampleksas 4 paĝojn, kaj kostas unu respondukuponon por 10. Tiu pri Francujo estas verkita en kunlaboro kun s-ro Couteaux.

Interalie, la brita movado kolektas monon por aĉeti sian propran domon, kaj esperas, ke post nelonge ĝi povos tion fari.

E. D. DURRANT.

« BRAZILA REVUO DE GEOGRAFIO » ENHAVOS ESPERANTO-RESUMOJN.

Dum la solena fenna kunsido de la Naciaj Konsilantaroj de Geografio kaj Statistiko (el kiuj konsistas la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko), lastjare okazinta en Rio de Janeiro, la prezidanto de Brazila Ligo Esperantista faris paroladeton, kiu finiĝis per dankaj vortoj al s-ro D-ro Mario Teixeira de Freitas, ĝenerala sekretario de la Instituto, kiu prezentis la unuanime aprobitan proponon, ke la Instituto alprenu Esperanton, kiel duan lingvon.

Post la paroladeto, s-ro D-ro Leite de Castro, sekretario de la Nacia Konsilantaro de Geografio, deklaris al la prezidanto de la Ligo, ke la baldaŭ aperonta «*Brazila Revuo de Geografio*» enhavos esperantan resumon de siaj artikoloj.

Nun tiu deklaro fariĝis fakto. Ĝus aperis la unua numero de tiu revuo, belaspekta, enhavanta 144 paĝojn sur tre bona papero, kun la Esperanto-resumoj de siaj ĉefaj artikoloj. Unu el tiuj artikoloj, kies titolo estas: «*Homa geografio de Brazilo*», estas verkita de la fama franca geografo Prof. Pierre Deffontaine.

Denove disputo pri oficiala lingvo

Elstara okazaĵo interrompis la finajn teknikajn diskutojn ĉe la Internacia Konferenco pri Fluida Brulaĵo kaj Aertransporto, al kiu kvardec nacioj sendis reprezentantojn. En paragrafo 4 la konferenco decidis ke estos du oficialaj lingvoj por la diskutoj : angla kaj franca. Pasmalgrade la germanaj delegitoj levis la demandon, ĉu estu nur unu lingvo, la angla; sed, se pli ol unu, la germana lingvo estu unu el ili. Post kelkaj mallongaj interŝanĝoj de opinio, la origina arango estis subtenata de grandega plimulto.

Hodiaŭ diskutante la decidojn en ilia fina provformo, la germanoj revenis al la atako, insistante ke estu nur unu oficiala lingvo, la angla, kaj ke la germana registaro submetu al la konferenco oficialan tradukon germanlingvan, kaj ke tiu traduko estu almetata kiel aŭtentika dokumento. Se la konferenco ne konsentus, la germana registaro ne subskribus la konvencion. La italoj, subtenante la germanojn, insistis ke la itala registara traduko ankaŭ estu akceptata kiel oficiala dokumento.

Al ĉi tio la franca delegito rebatis ke, se la franca lingvo estus elbarita, li devus rezervi sian subskribon al la konvencio kaj peti sian registaron por novaj instrukcioj. La rusa delegito treege bedaŭris ian foriron de la decido de antaŭ du tagoj kiu, li forte argumentis, devus esti konservata; sed se la konferenco decidus favore al unu sola oficiala lingvo, li opinis ke tiu lingvo estu la franca kaj ke la rusa traduko de la diskutoj estu almetata al la origina dokumento samkondiĉe kiel tradukoj en la germana, angla kaj itala lingvoj. Unu sudamerika delegito proponis ke la sola lingvo estu angla kaj ke hispana traduko estu almetata al la dokumento.

Lordo Swinton, la prezidanto, post kelkaj pliaj interŝanĝoj de opinio, vodonigis, ĉu la origina paragrafo 4 konsenta al angla kaj franca kiel la oficialaj lingvoj estu konfirmata, kaj ĉiuj, escepte de la germanaj, italaj kaj aliaj delegitoj akceptis tion. La germanoj inform-

La Esperanto en " Idiot's Delight " estas bonega

Dum la lastaj semajnoj la B.E.A. estis en amika kontakto kun la angla filio de Metro-Goldwyn-Mayer pri la filmo, « Idiot's Delight », kun la celo orientiĝi pri propagando, kaj ni jam ellaboris kelkajn planojn tiusenca. Ankaŭ okazis interŝanĝoj de ideoj kun niaj francaj esperantistoj, kaj, simile faras en Francujo.

Antaŭ kelkaj tagoj okazis en Londono la privata monro de la filmo, kiun mia edzino kaj mi havis la privilegion ĉesti. Verŝajne, do, ni estas la unuaj eŭropanoj vid. la filmon, kaj kun granda plezuro mi povas raportii, ke la nivelo de elparolo estas mirinde alta. Kiam la unuaj esperantaj vortoj aŭdiĝis, ni apenaŭ povis kredi je niaj oreloj, tiel internacieca estis la prononcado. Oni devas memori, ke la cetera parto de la filmo estas parolata en la angla lingvo kun usona nuanco, kiu, kvankam neniel malplaĉa, estas samtempe rimarkeble ne la prononco kiu estas ĉiutaga en Anglujo. Do, des pli frapa estis la konstato, ke dum la angla lingvo ne estis tute ia nia, la esperanta fakte estis vere nia propra nemiskompreneble internacia lingvo. Tuj ni sentis nin absolute hejme!

Kiel jam raportite, la kvanto de Esperanto estas malgranda. Tio memkompreneblas. Ĝi nur servas por doni « lokan koloron » al kelkaj scenoj, kaj pli multe da Esperanto enuigas la grandan neesperantistan publikon. Sed, la vera naturo de la konversacio, kaj la klareco pli ol emfazas la taŭgecon de nia lingvo. Kiel sensanceliĝa kredanto je nia lingvo mi estas pli ol konfirmata pri ĝia kapablo esti film-lingvo. Ni devas vere gratuli al la aktoroj kaj ilia « konsilanto », s-ro Scherer, pro la perfekte kompetenta maniero, en kiu ili aplikas la lingvon.

La unua monro al la publiko okazos post tri/kvar semajnoj en Londono, kaj ĝenerale tra Anglujo dum la fruaŭtuno.

E. D. Durant.

is ke ili devas rekonsiliĝi kun Berlino kaj rezervas la rajton remalfermi la aferon. Okazos plia kunveno merkrede.

El « Manchester Guardian », 27-2-1939.

Henriko GIELB :

Prolingvaj malfacilaĵoj

La kriminologoj tute ne estas poliglotoj. —

La lingva problemo en la kolonioj. —

Someraj Universitatoj. — Rompitaj koroj...

Ja certe, neniu esperantisto, neos, ke en ĉiu lando oni povas trovi iun, aŭ eĉ plurajn lingvospertulojn, kiuj bone scias fremdajn lingvojn. La praktiko tamen montras, ke tiaj perfektaj poliglotoj tute ne estas multaj, aŭ, ni diru, ili estas malfacile troveblaj... Kompreneble, la kriminologoj ne estas esceptoj. (Vidu mian artikolon: Kriminologosciencaj Revuoj Internaciaj « Heroldo » n-ro 48/1004.)

Ĉiu el ni scias, ke aranĝantoj de kongresoj (ne temas pri Esperanto-kongresoj) klopodas ke ĉio estu kiel eble plej bona kaj kiel eble plej perfekta. Se la organizata kongreso estas internacia, certe oni ne ŝparas energion kaj monon por bone akcepti la eksterlandanojn kaj igi ilin hejmenporti el la kongreslando kiel eble plej favorajn impresojn. Interalie oni serĉas stabon da plej lertaj lingvosciantoj por kunligi la multlingvan gastaron. Oni devas tuj aldoni, ke ne ĉiuj landoj scias kaj kapablas aranĝi kongreson aŭ alispecan demonstracion. Italujo certe apartenas al la landoj posedantaj algrade tiujn kapablojn.

Jen do: Antaŭ kelkaj monatoj okazis en Romo la Unua Internacia Kongreso pri Kriminologoscienco. La kongreso estis oficiala aranĝo, kiun partoprenis ministroj, tribunalo-prezidantoj, juĝistoj kaj plej famaj scienculoj el multaj landoj. La kongreso eldonadis por la kongresanoj ĉiutagan Bultenon, redaktitan en kvin lingvoj: itala, franca, germana, angla kaj hispana. Krom diversaj komunikoj, aperadis en la Bulteno resumoj pri la laborkunsidoj kaj la voĉdonitaj rezolucioj. Oni estus povinta kredi, ke la redaktoroj de la Bulteno estos elektitaj inter la plej spertaj lingvistoj. Temis ja pri rezolucioj, kaj decidoj, kiuj poste estos proponataj al la registaroj por adopti ilin al la koncernaj leĝoinstitucioj, kie ĉiu esprimo estas tre grava kaj kelkfoje posedas kolosan signifon.

Tial ni ne miru, ke la kongresanoj skuis per la kapoj, kiam ili trovis en la Bulteno jenajn floretojn: « S-ro X... sugestis ŝanĝon en la germana (aŭ alia) teksto, por ĝin fari pli konforma al la itala originalo ». (Ni substreku, ke estis kvinlingva originalo.) Sekvu malgranda ekzemplo: « intimamente ingranati nella vita giudiziaria » (intime kaj ne divideble ligitaj kun la jurista vivo) estis tradukita: « Rechtsleben genau kennen » (precize konas la juristan vivon).

★

La vivo en la kolonioj, belgaj, francaj k. a. certe multe diferencas de la vivo en la koncernaj metropolaj landoj. La kaŭzoj estas diversaj: kulturo, raso, klimato k.a., kaj... lingvo.

Jes, la lingvo!

S-ro A. Sohler, ĝenerala prokuroro ĉe la apelacia tribunalo en Elisabethville (belga Kongo), en publikigita scienca laboro, diras tiuteme la jenon: « D'ailleurs, la différence de langues et de mentalités, rendent extrêmement difficile l'action morale de l'Européen sur l'indigène ». (« Cetere, la diferenco de lingvoj kaj de mentaleco EKSTERORDINARE malfaciligas la moralligan influon de la eŭropano al la indigeno »).

Tiel, do, laŭ la prokuroro Sohler, ĉefe pro lingvaj malfacilaĵoj estis neeble organizi en la kolonioj diversajn juĝejo-instituciojn, kiuj ekzistas en la koncernaj landoj metropolaj.

★

Tiel nomataj « Internaciaj Someraj Universitatoj » aŭ « Kursoj por eksterlandanoj » disvolviĝas ĉiam pli multe en diversaj landoj. La kaŭzoj estas tre multnombraj. La ĝenerala celo estas altiri kiel eble plej multajn eksterlandanojn. Celo pli intima estas instrui al fremdlandanoj la lingvon, kulturon, ideojn kaj ideojn de la koncernaj lando kaj popolo.

Tiuj fremdlandanoj, reveninte de tiaspeca universitato, konscie aŭ subkonscie, fariĝas propagandantoj de la lando, kie ili akiris siajn sciojn. Tia kultura kunlaborado reciproka disvolviĝas speciale intense inter landoj havantaj amikajn rilatojn politikajn. Tiuj landoj, reciproke, per diversaj mousubtenoj faciligas al la junularo kelkmonatan studadon eksterlande.

Kaj jen denove la lingvo!

Studento, kiu studis la francan lingvon (kaj la franca relative ne apartenas al la malfacilaj lingvoj) en la lernejo dum 5-6 jaroj, kun multaj esceptoj, veninte Francujon, perdas du, tri monatojn, sidante ĉe kurso kiel en alia mon-

AL BERN !

El Oriento, Okcidento,
El Nordo kaj de l' Ekvator'
Kunvenu po: kongreslabor'
La anoj de la « Nova Sento ».

ESPERANTOKURS

Esperanto
lernas på ett roande sätt

Esperanto, lingvo de tuta homararo, estas la unua lingvo, kiu estas komprenata de ĉiuj homoj. Ĝi estas la lingvo de la futuro. Ĝi estas la lingvo de la paco. Ĝi estas la lingvo de la amikeco. Ĝi estas la lingvo de la justeco. Ĝi estas la lingvo de la libereco. Ĝi estas la lingvo de la prospero. Ĝi estas la lingvo de la feliĉo. Ĝi estas la lingvo de la vivo. Ĝi estas la lingvo de la morto. Ĝi estas la lingvo de la ĉielo. Ĝi estas la lingvo de la tero. Ĝi estas la lingvo de la universala. Ĝi estas la lingvo de la eterna. Ĝi estas la lingvo de la eterna. Ĝi estas la lingvo de la eterna. Ĝi estas la lingvo de la eterna.

« **E**stiĉu ĉi tiu lingvo?»
« **S**ankta **E**ngliŝo?»
« **P**reski tiu **H**ollandsk?»
« **E**ŝperanto **L**atinas?»
« **R**uĝo **N**orvega?»
« **A**ŝperanto?»
« **S**prechu **N**ie **D**eŝu?»
« **T**io **K**io **P**resas?»
« **Ĉ**u **E**spas?»

Kontraŭ **R**ojan
Kontraŭ **L**atinas
Kontraŭ **N**orvegas
Kontraŭ **D**eŝoj
Kontraŭ **E**ngliŝoj
Kontraŭ **H**ollandsk

Kontraŭ **H**ollandsk
Kontraŭ **D**eŝoj
Kontraŭ **E**ngliŝoj
Kontraŭ **H**ollandsk
Kontraŭ **D**eŝoj
Kontraŭ **E**ngliŝoj

Kontraŭ **H**ollandsk
Kontraŭ **D**eŝoj
Kontraŭ **E**ngliŝoj
Kontraŭ **H**ollandsk
Kontraŭ **D**eŝoj
Kontraŭ **E**ngliŝoj

Kontraŭ **H**ollandsk
Kontraŭ **D**eŝoj
Kontraŭ **E**ngliŝoj
Kontraŭ **H**ollandsk
Kontraŭ **D**eŝoj
Kontraŭ **E**ngliŝoj

Efika* propagandilo

Antaŭ la lastsezonaĵ Cseh-kursoj de s-ro T. Morariu estis farita efika propagando en la montrofeneŝtro de librejo Westling en Orebro, Svedlando : inĝer Esperanta libraro estis elmetita la ĉi-apude reproduktita aĝiŝo. Tiu tre lerte kombinita propagandilo montras supre, maldekstre, la kapojn de la kvar ĉefaj ŝtatgvidantoj de l' aktuala Eŭropo, kun suba grupbildo de la esperantistaj kongresanoj en Londono (sur la kliŝo malbone rekonebla); aldonita estas klariga cito el intervjuo de la sveda gazeto « Orebro Dagblad » kun s-ro Morariu, ke la kvar ŝtatgvidantoj ne kapablis interparoli sen helpe de interpretisto, sed ke en Londono bonjuge interkompreniĝis 1600 kongresanoj el 30 nacioj, dank' al Esperanto.

Supre, dekstre, specimenaĵ korespondadaĵo alvenintaĵo post anonceto en Esperanto-gazeto, kaj klariga teksto pri Cseh-metoda kurso.

Malŝupre tre interesa « lingvosimfonio » el nacilingvaj akordoj. Flanke staras la rumana kursgvidanto.

La fotoj faris s-ano E. Lindblad el Borlångeg.

do. Komprenante malmulton (aŭ nenion), ĝi surbuŝigas sian manon por kaŝi la... oscudojn...

La altaj celoj do, la riĉaj elspozoj, la junaj fervoro kaj energio, estas perditaj pro lingvaj malfacilaĵoj. Kiel bonege tiaĵ internaciaĵ universitataĵ povus esti organizitaj per Esperanto, eĉ se Esperanto servus nur kiel helplingvo, en kiun oni skribe tradukus la faritajn nacilingvajn prelegojn!



Kie estas amo, tie estas ankaŭ « rompitaĵ korjoj ». Oni diras, ke la amo estas « universala lingvo ». Eble jes, sed nur dum la geamantoĵ estas tiel proksimaj unu je la alia, ke ili povas « interkompreniĝi » per... gestoj. Sed kion fari, se iu el ili devas forveturi? Tiam okazas vera tragedio. Skribi per gestoj, aŭ kompreniĝi ion perlete per gestoj — neniu, mi kredas, ĝis nun estas sukcesinta.

Franĉujo sendube estas unu el la plej altirataĵ landoj, precipe kiam temas pri studema

junularo. La someraj universitatoĵ por eksterlandanoĵ vere diskreskiĝis en tiu lando, altirante milojn da eksterlandaj studentoj.

La pasintan someron mi konatiĝis kun gejunuloĵ el pluraj landoj; inter ili ankaŭ kun kelkaj diverslandaj esperantistoj. Same konatiĝis kun la eksterlandanoĵ miaĵ francaĵ samfakultatanoĵ. Antaŭ mallonge venis al mi iu kamaradino kun « sekreto ». Ŝia amiko, la hungaro, kun kiu ŝi konatiĝis, sendis jam kelkajn leterojn en la « franca » lingvo, sed... preskaŭ nenion el ili ŝi povas kompreni! Fine li skribis germane.

Tiu leteron ŝi petis min traduki...

Por « malrompiĝi » tiu'n du junajn korĵojn, mi donis al ŝi konsilon, kaj la samon mi igis ŝin skribi al li: Tro longe daŭrus por ŝi lerni la germanan lingvon (ne lian naciacion, la hungaran) kaj terure malfacila montriĝis por li la franca. Tial do, ambaŭ ekstudu Esperanton!

Ŝi jam komencis; kredeble la amanto ankaŭ profitos la bonegan avantaĝon.

La Austria Esperanto - Pioniro Dir. Schamanek 80-jara

Unu el niaj plej fervoraj Esperanto-pioniroj fariĝis la 15-an de marto 80 jara : Nia Esperanto-vulkano, la tre ŝatata ierneja direktoro **Josef Schamanek** en Unter-Tullnerbach bei Wien (tio estas lia adreso). D-ro Zamenhof estis precize je naŭ monatoj pli juna. En la sama monato (aprilo 1917), kiam D-ro Zamenhof mortis, Dir. Schamanek fariĝis la unua lektoro pri Esperanto ĉe la Teknika Altlernejo en Wien!

Interese estas, kiamaniere nia jubilanto fariĝis esperantisto kun jam 54 jaroj. En 1912 li, kiu tiam estis tre ŝatata direktoro kaj profesoro pri la franca lingvo, venis al Romo. (Li estis eĉ verkinta kun granda sukceso la fame konatajn « Conversations Françaises sur les tableaux d'Ed. Hoetzel ».) La Papo en Romo paroladis en aŭdienco franclingve, sed el la multaj ĉeestantaj diversnacioj nur kelkaj komprenis lin. Tiam Dir. Schamanek estis ekaŭdinta ion pri Esperanto kaj Ido. Nun li ekstudadis la diferencon kaj decidis, vojaĝi eĉ al Bern al la 9-a Univ. Kongreso de Esperanto. Tie li paroladis kun la « majstro » kaj... li fariĝis dum la sep kongrestagoj tiel fervora esperantisto, ke li jam post ĉi tiuj nur malmultaj tagoj faris sian Esperanto-ekzamenon en Bern! Kion nia jubilanta Esperanto-vulkano atingis por kaj en Esperanto, spite de tio, ke li komencis labori estante jam 54-jara, tion detale priskribi ne estas eble. Mi nur substrekas, ke li kun grandega ĝojo propagandis kaj gvidis multajn kursojn, li verkis tre bonkvalitan Esperanto-lernolibron kaj estis dum multaj jaroj membro de la — sur la mondo — unua « ŝtata Esperanto-ekzamen-komisiono », je kies ekestado li havis tre grandan meriton.

Nun li ankoraŭ kun ĝojo observadas la sukcesojn de Esperanto en sia vilao meze de bela ĝardeno en Unter-Tullnerbach kaj — li kune kun la verkinto de ĉi tiuj linioj treege estas konvinkita, ke certe venos la tago, kiam nia lingvo denove forte ekfloros en nia patrolando kaj — « Ex oriente lux! » (el oriento lumo) — ni eble ne malprave esperas, ke por la tuta grandega lando kun 80 milionoj tiu « Lux » venos el Wien, kie Esperanto havis tiom da sukcesoj! Ni nur devas havi multe da paciento dum kelka tempo — « obstine antaŭen! » — ni ne ĉesos. Sed — multo, tre multo dependos

Esperanto progresas en Danlando

Post la enkonduko de Esperanto en la danajn vesperiernejojn la movado bone progresas. La esperantisiaj organizoj elektis tutlandan instru- gvidanton por organizi la propagandon kaj kursaraĝojn. Li jam sukcesis starigi multajn kursojn, plejparte pere de lokaj grupoj aŭ lokaj instruistoj. Li mem instruas naŭ kursojn dum tiu ĉi vintro. Lia nomo : Ricn. G. Nielsen, Nykøbing F.


La junular-gazeto « Frisindet Ungdom » publikigis tre favoran artikolon, en kiu oni postulas regulajn Esperanto-dissendojn (instruadon) en la dana radio. Multaj danaj gazetoj reprenis la postulojn, konsentante je la proponoj de F. U. Nun « Frisindet Ungdom » ennavas regulan Esp.-rubrikon, kiun redaktas s-ro Nielsen. — Organo de la vesperierneja organizajo « Den danske Aftenskole » ĉiunonate enhavas informojn pri la progreso de Esperanto, kaj la gazeto subtenas la laboron por ekhavi Esperanton en la dana radio. — La taggazeto « Viborg Veustreblad » ĉiusemajne ennavas Esp.-rubrikon.

En Fakse Ladeplads la komunuma lernejo baldaŭ plilongigos la lernejan tempon ĝis 8 jaroj kaj tiam enkondukos Esperanton kiel devigan fakon por la infanoj de lastjara frekvento. Instruisto estos s-ro O. Christensen. En aliaj danaj lernejoj oni jam libervole enkondukis Esp.-instruadon. — Dana Esperanto-Ligo sendis al ĉiuj bibliotekoj en la lando cirkulerojn, rekomendante diversajn librojn Esperantajn; oni petas ke ĉiu biblioteko ekhavigu al si malgrandan Esp.-fakon; multaj jam havas. — Dana vojaĝoficejo O. P. Rejsebureau, Axelborg, Kopenhago V, kun filioj en la grandaj urboj de la lando, nun starigis specialan fakon « Esperanto-vojaĝoficejo por Danujo », kies gvidanto estas s-ro Nielsen.

de la eksterlando! Se ni povos montri ĉiam pli kaj pli grandajn sukcesojn en ĉiuj aliaj landoj, kaj se ni povos pruvi, ke Esperanto estas taŭga interkompreniĝilo — ankaŭ por tiaj interparoladoj, kiaj okazis en Berchtesgaden, Godeŝberg kaj München, kie la plej altrangaj ŝtatgvidantoj ne povis senpere kompreni sin reciproke, ni povos venki la nunajn grandajn antaŭjuĝojn en nia lando, kie Esperanto floradis dum jardekoj! Tiu senĉesa laboro ĉiulanda estu la gratulo al nia jubilanto! Kuraĝe antaŭen!

Rudolf Michael Frey, Wien,
lasta vicprezidinto de AEA.

Nia Esperanto-Filmo



Antaŭ unu jaro, pro konataj kaŭzoj, devis likvidiĝi la **Aŭstria Esperanto-Asocio**, kiu dum multaj jaroj tiel bone laboris por nia afero, Nia unua bildeto montras la **lastan estraron** de AEA ; de dekstre maldekstren : la kasistino Maria Fiedler ; la sekretario Martin Schnell ; la prezidanto reg. kons. Fritz Stengel ; la vicprez. kalkul-kons. Rudolf Mich. Frey ; kaj por propagando poŝtovicisto R. Ulbrich.

Sur la dua bildeto prezentas nia samideano kaj IEL-delegito **Peter H. Holm en Nordby (Fanö)**, **Danlando**, sian plej novan mempretitan varb-afiŝon : « Spröget for alle » = Lingvo por ĉiuj. La cetera estas komprenebla de si mem.

Kio okazis sur la tria bildo ? Ĉu karnavalo en libera naturo ? Ĉu homoj forkurintaj el... ejo ? Neniel. La fotografinto nur estis petinta la fotografotajn **gesamideanojn skotajn**, ke « prefere ilj ne aspektu, kvazaŭ temus pri funebro » ... Kaj jen la rezulto ! Oni almenaŭ konfesu ke ili sukcesis « malserioziĝi ».

Sed sur la kvara foteto — jen vere **karnavalo en la hejmo de esperantista familio en Rejnlando**, kie — kiel sciante — oni plej bone komprenas festi tiun « feston de la frenezuloj ».

Sur la kvina bildeto, fine, ĉu denove karnavalo ? Oni povus kredi. Tamen ne estas tiel. Kiu do estas tiu sovaĝaspekta militisto feroce kun plumornamitaj ĉapelo kaj ŝildo ? Li nomas sin « **la Reĝo de la Ruritaniaj Ciganoj** » ; sed se vi atente rigardos lian vizagon, vi ekkonos en la feroce cigana reĝo nian tute paceman, simpatian, 77-jaran sed ĉiam junkoran anglan samideanon Robert Robertson. Oni memoras ke okaze de la Londona Kongreso iu hungara skolt-samideano alportis grandan kvanton da « orfinharo », herbo aspektanta kiel delikataj plumoj. Nun s-ro Robertson uzis la okazon de « Cigana Foiro », organizita de la Kongregacia Preĝejo de Wood Green (Nord-Londono), por revendi tiun « orfinharon » bonfarcele. Li bone sukcesis.

NI RECENZAS

Prosper Mérimée : **Colomba**. Tradukita el franca lingvo de Prof. J. Beau. 192 p., 11×18 cm. Prezo 1 š. 6 p. (plus afranko 2 p.) ĉe la eldonejo : Esperanto Publishing Company, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Colomba — Elektra... Jes, kiam mi pensas pri tiu ĉi bela korsikanino, Colomba, kiu tiel pasie, tiel persiste estis obsedita de la penso venĝi sian patron, nevole antaŭ miaj okuloj aperas alia figuro, tiu de la greka heroino de l'fama helena tragediisto Eŭripido.

Kiel Elektra instigis sian fraton Oresto, mortigi la murdinton de ilia patro Agamemnono, tiel ankaŭ Colomba ĉie kaj ĉian senparole per esprimoplenaj rigardoj, per ĉiuj siaj aĝmanieroj kaj aludoj petegis sian fraton Orso plenumi la venĝon.

Ŝi juris ne formeti la funebrajn vestojn, ĝin ŝia patro estas venĝita... Ŝi konservas, kiel sanktan relikvon, sangmakulitan, trakugitan, ĉemizon de sia patro... Ŝi metas ĝin en la manojn de sia frato por vekti en li kiel eble plej grandan venĝosenton... Ŝi estas kvazaŭ belega, inkuba spirito soifanta sangon kaj morton de iliaj ofendintoj... Ŝi estas la enkorpigo mem de tiu kruela, senkompata venĝo, kiun korsikanoj nomas « vendetta ».

Per tiu ĉi bela rakonto, bone tradukita de s-ro Beau (escepte de la vorto « vinfolio » anst. « vinberfolio »), finiĝas — kiel anoncas aldonita informbulteno — « **Epoko-Libroklubo** ». Kaŭzo? Nesufiĉa nombro da abonantoj. Samideanoj! Ĉu ne estas via devo subteni tiun simpatian entreprenon, kiu intencis doni al la esperantistaro agrablan, distran kaj nemultekostan leĝaĵon? Do rapidu per viaj mendoj revivigi « **Epoko-Libroklubon** »!

De S.

Lu-Bi : **Esperanto** ? — 50 p. 13×19 cm. La unua lernolibro por siamanoj. Kun tabelo de la korelativoj. Prezo ne indikita. Eldonis : S-ro Lu-Bi, c/o Hah Seng, Dhonburi, Siamo.

Bedaŭrinde la siamaj literoj kaj lingvo estas por ni Sfinska enigmo; sed kompreneble ni tre ĝojas pri la apero de la unua Esperanto-lernolibro por siamanoj. Espereble la rezulto de la eldono baldaŭ montriĝos en la organizo de kursoj kaj la fondo de kluboj en la azia reĝlando Siamo.

Grundregler for straks at kunne tale og skrive Esperanto. — Koncizega lernolibreto de Esperanto por danoj. Ricevebla por 0.35 dan. kr. de la aŭtoro A. P. Olesen, Vestergade 90, Horsens, Danlando.

N. Kurzens : **Mia spektro**. Poemoj 1931-1935. — 64 p. 12×17 cm. Prezo 0.30 dol. (bd. 0.46 dol.) plus 10 0/0 por sendkostoj. Eldonis Lit. Mondo, Budapeŝt.

Kvazaŭ tuta vivo deruliĝas antaŭ ni en tiuj versoj : juneco, ardo, defio, dubo, retroviĝo, rezigno. 59 mallongaj poemoj en facilflujaj versoj, ofte virtuoze-lerte kombinitaj, foje mirinde koncizaj, lingve senriproĉaj. Oni povas sin demandi, kial la aŭtoro bezonis (ĉu bezonis?) en du-tri el la lastaj poemoj novajn vortojn, dum en la ceteraj poemoj li povis facile sin esprimi sen neologismoj? M.

Emba : **En ekzilo**. Originalaj poemoj. — 64 p. 12×17 cm. Prezo 0.30 dol. (bd. 0.46 dol.) plus 10 0/0, ĉe la eldonejo Lit. Mondo, Budapeŝt.

Ĉar samtempe ĝi aperis kun « **Mia spektro** » de Kurzens, oni emas kompari ĉi tiun poemlibron kun la alia. La diferenco estas sufiĉe granda. La versoj de Kurzens viglas, saltas, fajreras kaj tamen facile legiĝas; la 29 poemoj de Emba paŝas peze, aŭ kviete, kaj preskaŭ egalritme. Ilia enhavo estas pli profunda; sed ili legiĝas nefacile.

Ambaŭ poemlibretoj estu rekomendataj al la literatur-amantaj samideanoj. Ankaŭ ili legu kaj komparu! M.

Célestin Rousseau : **Amo, fonto de vivo**. Poemo originale verkita. 16 p. 13,5×18 cm. Prezo 3 fr. fk. Eldonis Esperantista Centra Librejo, Paris 6.

Bele eldonita versaĵo kiu igas nin denove travivi, laŭ la Biblio, la kreon de l' unuaj homoj, la vekigon de l' amo, la forpelon el la Paradizo, kaj la spiton de l' homo kontraŭ la Naturo — pro l' amo. — Nova vorto « nubila » : kaj « orkidoj » anst. « orkideoj ». M.

Flandrujo vokas vin. Afiŝo ĉ. 52×70 cm., presita verde kaj nigre sur flava fono. La afiŝo montras la silueton de l' katedralturo de Antverpeno kaj grandan verdan steĉon, kaj ĝi invitas al la 21-a Kongreso de IKUE (katolika mondkongreso), kiu okazos la 5.-10.8. en Antwerpen (Belgujo). Adreso de la sekretarioj : Potgieterstraat 1.

J. Lazauskas : **Tarptautinės Esperanto Kalbos Vadovėlis su zodynėliu**. 112 p. 12×16 cm. Prezo 1 lido. Eldonis A. Slonimskio spaustuvė, Ukmergė, Litovio.

B. Radziminski : **Podrecznik Jezyka Esperanto**. Lernolibro por poloj. en 15 lecionoj. Tria eldono. — 63 p. 133×19 cm. Eldono de la aŭtoro : B. Radziminski, Chelmo, Pona., Polujo — Prezo ne indikita.

N. Bartelmes : **Vartejoj**. Romano. — 128 p., 13×18 cm. Prezo 13 fr. fk. + 15 0/0 por afranko. — Eldonis SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20, Francujo.

Ne ofte oni havas okazon legi originalajn verkojn skribitajn per tia korekta, flua kaj bela lingvo. Oni legas paĝon post paĝo facile. Oni ĝuas la lingvon, oni admiras tiel majstre kombinitajn, kvazaŭ malfacilajn sed tuj komprenablajn vortojn. Ĉio estas klara, ĉio estas bona, ĉio — neriproĉebla, kaj tamen... tamen oni nevole sulkiĝas la frunton, ĉar la donitan de la aŭtoro problemon, seksproblemon de l' homoj en socia kunvivo, ne estas tiel facile solvi, kiel ŝajnas en la unua momento.

La kuraĝeco, kun kiu li fortiras la vualon kaj montras en ĝia tuta nudeco certan flankon de tiu ĉi problemo, preskaŭ perpleksas. Kelkaj lokoj de la enhavo estas simple ŝokaj, por ne diri malmoralaj, kaj tial la enhavo ŝajnas esti malskrupula, aŭdaca kaj, eble, eĉ prijuĝenda... Sed estas pli bone, ke la legantoj mem, ĉiu « laŭ sia propra temperamento », prijuĝu ĝin.

Unu solan erareton (« petolino » anstataŭ « petolulino ») kaj tre trafan, originalan esprimon « araneumi » mi trovis en tiu ĉi stranga romano. De S.

L. Malah : **Misisipi**. Teatraĵo en tri aktoj, el la juda lingvo tradukis I. Jurysta. Eldonis : Juda Esperantista Grupo en Parizo. Aĉetebla ĉe Ch. KERBER, 39 avenue Gambetta, Paris 20, kaj ĉe SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20. Prezo : 10 fr. fk. plus 10 0/0 por sendkostoj. Amplekso : 64 paĝoj ; formato : 13×21.

La dramo « Misisipi » pritraktas la Skotsboran tragedion, kiun prezentis Usono antaŭ kelkaj jaroj. Sep negroknaboj, el kiuj la plej juna estis dektrijara, estis kondamnataj al morto, ĉar ili, laŭdire, sed ne efektive, seksatencis kaj perfortis du blankulinojn, cetere prostituitinojn, kiuj hazarde veturis kun ili senpage en sama ŝarĝvagono.

La verko montras, kiel la rasmalamo servas por dividi la suprematojn, la blankan kaj la nigran proletarojn. La devizo estas malnova : Dividu kaj regu !

Ĉu mirige estas, ke judo judo verkis ĉi tiun dramon pri siaj negraj samsortanoj, kaj ke judoj eldonis ĉi tiun esperantan tradukon ?

La malamiko de popoloj kaj rasoj ne estas aliaj popoloj kaj rasoj, sed tiuj, kiuj ilin dividas, ilin trompas, semas malamon kaj malfidon inter fratoj samsortaj, kaj ilin egale ekspluatadas kaj buĉigadas en militoj. P. R.

Jarlibro de Sennacieca Asocio Tutmonda. 32 p., 14,5×22 cm. Nur por membroj de SAT. Kun Statuto, alvoko de B. Wels, tarifoj, datoj, listoj, superrigardoj, adresaro ktp.

Foire de Paris, 13-29 Majo 1939. — 16-paĝa broŝuro, ĉefe ilustraĵoj kun teksto (en Esperanto), presita en koloroj oranga kaj bruna. Kun aldona **Karto de Aĉetanto** (same en Esperanto). La efika **aliĝego** ŝajne estas ankoraŭ tiu de la pasinta jaro. Ĝi montras la literojn FOIRE DE PARIS en formo de ŝipo. Krome troviĝas sur la afiŝo la vortoj : Foire de Paris. ĉiujare en majo, kaj : Esperanto uzata. — Adreso : Foire de Paris, 23 Rue Notre-Dame des Victoires, Paris, Francujo.

Amsterdam (Holland). « Ĉu vi scias ke Amsterdam, kiu enhavas 800,000 loĝantojn, estas la ĉefurbo de mondŝtato de 75 milionoj da enloĝantoj? — ke Amsterdam, la Venecio de la Nordo, estas fama pro sia duonlunforma centro de la urbo, kun siaj 50 kanaloj, 350 pontoj kaj pli ol 4000 antikvaj konstruaĵoj kaj monumentoj? » — Bela faldprospekto, multkolora presita, kun urboplano. Teksto en Esperanto. Petu la prospekton de : La Societo per Fremdultrafiko, Rokin 5, Amsterdam, Nederlando.

Brugge (Bruĝo), Belglando, la ĉarma, artplena urbo, eldonis 12-paĝan faldprospekton en Esperanto, kun multaj ilustraĵoj. Interesuloj petu la prospekton de : Oficiala Servo por Turismo, Halle, Markt, Brugge, Belgujo.

Estu **bonveninta al Horsens!** Broŝureto-traduko de faldprospekto « 5 Dage i Horsens ». Horsens estas malnova urbo dana kun 30.000 loĝantoj. Interesuloj petu la broŝuron, sendante respond-kuponon al la tradukinto s-ro A. P. Olesen, Vestergade 90, Horsens, Danlando.

« **Mooi Veluwe** », libertempejo kaj esperantista renkontejo, Garderenscheweg E 40, Putten, Nederlando, eldonis 6-paĝan faldprospekton ilustritan, krome potskarton kaj flugfolion, ĉion en Esperanto. Kiu interesiĝas pri malmultekosta restadejo, turnu sin al la indikita adreso.

La Najtingalo. Esperantista kantaro. kompilita pere de Suda Kruco. Dua kolekto (33 kantotekstoj). — 32 p. broŝ. Prezo 0.12 old. ĉe la eldonejo « Malnova Turo », Oude Torenstraat, Eindhoven, Nederlando.

Katalogo de SAT (1938-39). — 16 p. broŝ. Enhavas ĉefe la eldonajn de SAT, kotiz- kaj abon-tabelon, insignojn ktp. Eldonis : SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20, Francujo.

Esperanto! Katalogo de Esperantaĵoj de la firmo « Spiktur », Alabin 50, Sofia, Bulgarujo. — 24 p.

La libroj estu viaj amikoj! Sub tiu ĉi devizo aperis nova katalogo (ian. 1939) de Förlagsföreningen Esperanto, Box 698, Stockholm I, Svedujo. — pri Esp.-instrulibroj, vortaroj, literaturo ktp. — 24 p.

ESPERANTO EN RADIO

ESPERANTO-RADIO-PROGRAMO.

Kompilata de la redakcio de « Heroldo de Esperanto », laŭ la komunikoj ricevataj de diversaj flankoj. Ni ne menciis la ekster-eŭropajn sendstaciojn. Pro enkonduko de la somera tempo en okcidenta Eŭropo post 15.4.1939, ni indikis la horojn laŭ MET (Mez-Eŭropa Tempo), kiu post 15.4. estos egala al somera GMT. Ĝis 15.4. okcident-eŭropanoj deprenu unu horon. Nederlandanoj ĝenerale deprenu 40 minutojn.

Regulaj dissendoj.

Dimanĉe :

- 9.45-10.00 (post 15.4. supozeble 8.45-9.00)
Lille 247 : Kurso aŭ prelego, escepte de 9.4.
10.10-10.25 (post 15.4. supozeble 9.10-9.25)
Kortrijk 204 : Kurso aŭ informoj. (Ĉu ili ankoraŭ okazas ?)

Lunde :

- 18.40-18.50 Sottens 443 : Kurso.
21.50-22.10 Roma 2 RO 6 (19.61) kaj 2 RO 9 (31.02), eventuale ankaŭ Roma II (245) : Politikaj informoj.
23.45-00.30 (post 15.4. supozeble 22.45-23.30)
Paris PTT 431 : Esp.-teatraĵo. (La 10.4. dissendota je kvaronhoro pli malfrue, per Radio-Paris 1648 m.)

Marde :

- 21.20-21.35 Kaunas 1935 ; Klaipeda-Memel 531
Lyiae 41 : « Nia anguleto ». (Ĉu ankoraŭ okazas ?)
22.00-22.10 Tŭri 410 ; Tartu 579 ; Tallinn 229 : Esp.-kroniko.

Ĵaŭde :

- 10.30-10.45 (post 15.4. supozeble 9.30-9.45)
Paris 431 : Esp.-kurso.

Sabate :

- 18.40-19.00 Roma II (245) ; IRF (30.52) kaj 2 RO 9 (31.02) : Turisma kroniko.

★

Aliaj dissendoj dum aprilo.

- 1.4. 16.30-17.00 Lille 247 : Interesa skeĉo.
17.10-17.25 Jaarsveld (VARA) 415 : Prelego.
18.10-18.25 Hilversum (KRO) 1875 kaj 301 : Prelego.
2.4. 10.30-10.45 Marseille 400 : Informoj pri la Esp.-movado.
19.10-19.25 Irlandaj stacioj (Dublin 531) : Irlanda influo en Eŭropo.
22.00-22.30 Bulgaraj stacioj 253, 235 kaj 35.4 : Kultura revuo.

- 4.4. 20.35-20.45 Bordeaux 278 : Kroniko.
9.4. 23.40-24.00 Hilversum (KRO) 1875 kaj 301 : Prelego.
12.4. 22.00-22.30 Bulgaraj stacioj 253, 235 kaj 35.4 : Prelego.
13.4. 20.52-21.00 Lyon 463 : Informoj.
15.4. 17.10-17.25 Jaarsveld (VARA) 415 : Prelego.
18.10-18.25 Hilversum (KRO) 1875 kaj 301 : Informoj.
18.4. 18.10-18.25 Irlandaj stacioj (Dublin 531) : Eŭropa influo en Irlando.
20.4. 21.40-22.00 Tŭri 410 : Prelego.
23.4. 23.40-24.00 Hilversum (KRO) 1875 kaj 301 : Prelego.
26.4. 22.00-22.30 Bulgaraj stacioj 253, 235 kaj 35.4 : Prelego.
28.4. 22.50-23.00 Ljubljana : Prelego.
29.4. 17.10-17.25 Jaarsveld (VARA) 415 : Prelego.
18.10-18.25 Hilversum (KRO) 1875 kaj 301 : Informoj.

APRILA ESPERANTO-PROGRAMO DE PARIZO.

Ĉiulunde je 22.45 GMT (t. e. ĝis 15.4. je 23.45 MET), ondo 431 m.; la 10-an de aprilo dissendota per ondo 1648 m., kaj kvaronhoro pli malfrue — bonvolu esplori vian radio-revuon! Enondigo de Marc Darnault. — Nepre aŭskultu kaj skribu dankleteron al : Courrier des Auditeurs, 107 rue de Grenelle, Paris 7, Francujo.

- 3.4. « La kara mortinto », unuakta komedio de Stanley Houghton, tradukis Kudrilo. Prezentos s-ro Guillaume.
10.4. Scenoj el « La Pasio de Jesuo », sankta dramo de Robert Dol; tradukis A. Rémond.
17.4. « La homo, kiun mi mortigis », fama teatraĵo de Maurice Rostand, tradukis A. G. Provost. Prezentos s-ro Arger.
24.4. « Amo, fonto de vivo », poemo de Célestin Rousseau, kaj : « Intervjuo », skeĉo de Julio Baghy. Prezentos f-ino J. Paulier.

★

FELIĈAJ PREMIITOJ.

La esperantistaj premiitoj de la 5-a Radio-Konkurso de ENIT, laŭ la lotado, estas : S-ro Rudolf Degi, Podmaniczky u. 65, Budapest VI Hungarujo, kaj s-ro P. A. Rodger, 41 Fife Road Darlington, Anglujo. Koran gratulon al ili, kaj multe da plezuro okaze de ilia senpaga liber-tempo en Italujo !

I. S. E. J.

Dum la dua Universala Kongreso de Esperanto en Genève oni fondis « Internacian Societon de l' Esperantistaj Juristoj (I.S.E.J.). Kiel prezidanto estis elektata s-ano Michaux, advokato en Boulogne, kaj kiel ĝen. sek. s-ano Sergeant, advokato samloke. La nomaro de la jaro 1908 enhavis ĉ. 120 adresojn, inter kiuj ankaŭ tiun de s-ano Paul Degon, kiu fariĝis poste ĝen. sekretario. Li raportis en 1910 al la ĝenerala kunveno, ke la societo kreskis per 39 novaj anoj, kaj ke la organo de la societo fariĝis « La Revuo », tre gastamig akceptante prijurajn artikolojn. Oni laboris tiam en tri fakoj: s-ano Laigner, advokato en Reims, prezidis la vortaran fakon; s-ano de Laparte estis la redakcia sekretario kaj prizorgis la presadojn; fine s-ano Degon plenumis la administradon kaj propagandon.

Bedaŭrinde la milito ĉesigis la agadon de la societo. Post la milito oni devis rekomeni, rekolekti la anojn. Kiel unua klopodis revigliĝi la societon s-ano J. Litauer, advokato en Varsovio. Samtempe D-ro Liebeck, advokato en Berlino, publikigis alvokon en « Esperanto Triumfonta » (nuna « Heroldo de Esperanto »). Kolektiĝis la interesatoj. Iliaj nomoj estis publikigataj en « Heroldo » kune kun invito al partopreno en faka kunsido en Geneva Kongreso 1925. Tie la malnova I.S.E.J. estis restarigata, kun s-ano Michaux reelektata kiel prezidanto. Kiel ĝen. sekretarioj estis elektataj s-anoj Litauer kaj Liebeck. Kunsidoj okazis poste en Edinburgh, Danzig, Kraków, fine en 1937 en Varsovio, kie oni elektis kiel prezidanton s-ron J. Couteaux (Parizo), kiu poste rezignis proponante anstataŭ si s-ron adv. Dröschat, ankaŭ el Parizo. Kiel sekretario-kasisto estis elektata D-ro Leopold Dreher, advokato en Kraków, kiu surpronis verki juristan terminaron esperanto-esperantan.

En tiu tempo la agado de ISEJ estis respiegulata en sufiĉe vigla maniero sur la paĝoj de « Nia Gazeto », kiu, dank' al la bonvolemo de ĝia redaktoro s-ro Avril, enhavis konstantan « Juran Fakon », redaktatan de la sekretario de ISEJ.

Nun por la jaroj 1939-40 la celo de ISEJ estos, krom kutimaj laboroj (pretiĝado de adresaro de juristoj esperantistaj por praktikaj celoj, por obliĝi aferajn rilatojn inter la anoj k. a.) pridiskuti definitivajn formajn de juristaj esprimoj en Esperanto, kies manko estas grava malhelpo en la antaŭenirado de Esperanto en la faka medio. La diskutado okazos pere de la oficialaj organoj de ISEJ, kiaj fariĝis, dank' al interkonsento kun IEL, ties gazetoj « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ».

La adreso de la sek.-kasisto estas: Advokato D-ro L. Dreher, Kraków, Po'ujó, Zwierzyniecka str. 9. La kotizon (1.00 sv. fl. jare) akceptas ankaŭ la Ĉefdelegitoj kaj Perantoj de IEL.

Ĉiuj juristoj-esperantistoj estas petataj kunlabori. En kio konsistas la kunlaboro? Unue, kompreneble, estas la devo de ĉiu jur.-esperantisto aliĝi. La kotizo estas ja preskaŭ nenio! Due, ĉiu povas helpi, verkante artikolojn prijurajn; sendante ilin al la sekretario de ISEJ, kiu zorgos pri unuecigo de la jura lingvo en Esperanto, antaŭ publikigo en la organoj. En la daŭro de la du jaroj 1939-40 la asocio devas esti nepre restarigata por atingi almenaŭ la staton antaŭmilitan. Trie, bonvolu atente legadi la oficialajn gazetojn, kie aperos jurista terminaro esp.-esperanta: viaj kritikoj kaj rimarkigoj servos por eldoni en 1941 kompletan vortaron de juraj esprimoj en Esperanto.

Parolas la leganto

« LA KONTRAŬILOJ ASERTAS... »

Sufiĉe ofte ni aŭdas la aserton ke Esperanto estas nur unu el pluraj (5-6) artefaritaj lingvoj kiuj vetkuras inter si por akcepto kiel unuenda helplingvo; ke ĝis definitiva elekto de tiu el la pluraj « konkurantoj » — elekto farota de iu oficiala grandpova instanco — oni ne devus aliĝi kiel partiano de iu ajn el la lingvaj projektoj.

La fakto estas ke nur Esperanto estas (se mi uzu la metaforon) « plenkreska kaj ekzercita kurĉevalo », tiranta ĉaron sur la praktikata kurkampo de l' mondo, dum ke la ceteraj projektoj por tutmonda helplingvo (menso-infanoj de bonintencaj teoriistoj) restas kvezaŭ novnaskitaj ĉevalidoj, jam ekkurantaj ja, sed nur ĉirkaŭe en la gemastra donkorto!

Ŭnu provo, sufiĉe frapa. Angla esperantisto, s-ro Roger Goodland, kiu ofte vizitas Kanadon kaj Usonon, renkontis en Novjorko, antaŭ proksimume ses jaroj, sinjoron, al kiu la lingvaj projektoj restis nur nomo. La sinjoro jam aŭdis kvar lingvonomojn — Esperanto, Ido, Novial, Occidental — kaj opiniis ilin iom egalaj konkurantoj sur la helplingva kampo. La esperantisto proponis al la amiko viziton de esploro al la publika biblioteko de la urbo Novjorko, por ekleri kiom da kartoj en la biblioteka kartkatalogo estos trovataj sub la nomoj de la respektivaj lingvoprojektoj. Sub « Esperanto » troviĝis plena granda tirkesto, enhavanta ĉ. 1000 kartojn kun nomoj de libroj, l'bretoj, artikoloj. Sub « Ido » troviĝis nur kvin kartoj, sub « Novial » unu karto, sub « Occidental » — neniu...
E. G. D.

La migranta junularo bezonas Esperanton

Kreskas kun ĉiu jaro la nombro de la junularo migranta piede aŭ bicikle, por ekkoni la belan mondon, la propran patrujon kaj fremdajn landojn kaj homojn. Tiu movado akceptis jam tre grandajn proporciojn, kaj en la vera senco de la vorto ĝi fariĝis internacia. En la junulargastejoj, same plimultiĝantaj ĉiujare, oni jam renkontas grandnombre gejunulojn el la plej diversaj landoj. Grava malhelpo tamen restas la lingva diverseco. La migranta junularo vere bezonas Esperanton.

Tiu gastejo ankoraŭ ne ekzistas unu jaron: ĝi malfermiĝis nur la 14-an de julio 1938, kaj tamen dum la du unuaj monatoj de sia ekzistado ĝi akceptis jam pli ol mil gejunulojn, inter kiuj ĉ. 150 eksterlandanoj: angloj, belgoj, nederlandanoj, amerikanoj ktp. Tio cetere ne estas miriga, ĉar tiu bretona regiono estas vere vizitinda. Quimper mem estas beleta urbo, ĉe la centro de pentrinda lando, 17 kilometrojn distanca de la maro, kaj proksime de multaj marbanlokoj.



Elpendaĵo
de la Junular-gastejo
« La Juna Vivo »
en Quimper
Bretonio, Francujo)
kun la Esperanto-stelo

Tion ekkoninte, oni jam komencis energian laboron ankaŭ en tiu direkto, precipe en Francujo, kiu entute nun, kiam niaj flugiloj estas pli malpli paralizitaj en la centra parto de Eŭropo, denove pli kaj pli fariĝas la fokuso de la Esperantomovado.

Nia kliŝo montras elpendaĵon de la « Auberge de la Jeunesse » (junulargastejo) « La Juna Vivo » en Quimper. Ĝi surhavas nian verdan stelon kiel signon, ke en tiu junulargastejo oni komprenas Esperanton kaj kun speciala plezuro bonvenigas eksterlandajn esperantistojn.

Prezidanto de la Junulargastejo en Quimper estas s-ro Ch. Le Séac'h, delegito de IEL en Loc Maria-Quimper. Li gvidas nun en Quimper du publikajn kaj tri lerneajn Esperanto-kursojn, kun entute ĉ. 80 partoprenantoj; 32 junuloj partoprenas kurson, malfermitan antaŭ nelonge en la Seminario por Instruistoj. « Sed », skribas al ni la fervora delegito, « tio estas nur komenco. Venontan jaron, la glermanitoj estos pli multaj. »

Gesamideanoj francaj kaj alilandaj, se foje vi venos en la regionon de Quimper, ne forgesu viziti la junulargastejon « La Juna Vivo » kaj la ageman delegiton.

La junularo estas nia estonteco!

TRA LA MONDO

Promenado

Estis en la antaŭtagmezo de la 15-a de marto. Antaŭ la urbdomo de Praha, kie kutime, deĵoris policano regulante la trafikon. Larmoj ruliĝis laŭ liaj vangoj. Apenaŭ li kapablis vidi.

Kiam mortas homo, ploras parencoj kaj amikoj. Kiam mortas ŝtato, ploras la nacio.

Sed la nacio restas. Ĝi vivas, kaj ĝi vivos.

Kaj restas, eĉ en la plej mallumaj tagoj, la espero je vere paca kunvivado de popoloj, sen superrego, en libereco kaj reciproka komprenado, iam en pli bela estonteco.

« Habemus Papam »

Blanka fumnubeto el kamentubeto sur tegmento de l'Vatikano sciigis al la atendantaj centmiloj sur Placo de Sankta Petro ke la tutmonda katolikaro havas novan papon. La elekto de l'kardinaloj trafis la ĝisnunan ŝtatestsekretario vaticanan, kardinalon Eŭgenio Pacelli. Li donis al si la nomon Pius XII-a. Li estis elektita en la sama tago, en kiu li finis sian 63-an vivojaron.

Pius XII naskiĝis la 2-an de marto 1876 en Romo el familio jurista. En 1917 li fariĝis papa legato («nuntius») en München, kaj tri jarojn poste en Berlino. De post 1930 li estis ŝtatestsekretario de sia antaŭulo, Pius XI. La nova papo estas la unua, kiu faris grandajn vojaĝojn: en 1934 al Sud-ameriko, kaj en 1936 al Usono. En la vico de ĉiuj papoj li estas la 262-a.

Ĉu nova bonfarto?

La brita ministro por internaj aferoj, Sir Samuel Hoare, deklaris okaze de bankedo de la Kanada Komerca Cambro en Londono, la 13-an de marto, interalie: « Mi kredas — kaj mia opinio estas bazita ne sur teoria kaj senfundamenta optimismo, sed sur signoj de la tempo, — ke komercio kaj industrio estas kreskant-

aj. Mi kredas ankaŭ, ke dum la pasintaj ses semajnoj okazis definitiva pliboniĝo. Se la mondo nur povus liberiĝi de politika malkvieto kaj aventuroj, mi kredas ke ni eble atingis unu el la plej grandaj periodoj de bonfarto en la mondo, kian ni iam konis. »

La ministro estas tre prava. Se...! Jes, se...

La « Blua Rubando de l'Oceano »

La « Blua Rubando » estas kvazaŭ mi-granta « ordeno » por tiu pasaĝera ŝipo, kiu plej rapide transveturis la Atlantikan Oceanon. Antaŭ dek jaroj ĝin posedis la « Mauretania », multe admirita ŝipo de la kompanio Cunard Line; en 1929 ĝin akiris la germana ŝipo « Bremen ». En 1930 la plej rapida ŝipo estis « Eŭropa », fratsipo de « Bremen ». Pli poste la Bluan Rubandon flirtigis la itala « Rex », la franca « Normandie », kaj nun ĝin prunte-posedas la angla Cunard-ŝipo « Queen Mary », kiu bezonis por la vojaĝo Eŭropo-Usono nur tri tagojn, 20 horojn kaj 12 minutojn. Laŭ gazet-informoj nun Germanujo estas konstruonta novan ŝipegon, kiu fariĝu la plej rapida en la mondo.

Kio estas demokratio?

Okaze de la 150-jara ekzistado de la Usona Kongreso (Parlamento), prezidanto Roosevelt faris paroladon pri la historio de la Kongreso kaj pri la avantagoj de demokratio. Li diris ke la demokrata reĝimo estas relative nova, kaj ke Usono kaj aliaj landoj ne opinias ke la demokratio estas eluzita. Ili ne volas reveni al reĝimo, kiu jam antaŭ du mil jaroj pruvis sian tiranecon kaj nefirmecon. Iliaj popoloj kaj individuoj volas esti protektataj kontraŭ senkompensa konfiskado de posedaĵo, kontraŭ senordone farataj traserĉadoj kaj arestadoj. Ili volas konservi la liberecon de kunve-

nado, de parolado, de gazetaro, de religio. Ĉi ĉion signifas, laŭ Roosevelt, la konstitucia demokratio.

Tarzan viviĝis

Tio okazis en Sumatro. Sur traarbara vojeto promenis indiĝeno kun sia edzino. La viro iris antaŭe, la virino sekvis laŭ distanco de kelkaj metroj. Subite la viro aŭdas kriadon. Returnante sin, li vidas sian edzinon atakata de granda tigro, kiu provas sin renversi kaj fortreni en la arbaron. Sen armiloj, la viro senhezite siavice atakis la atakinton per la nuraj pugnoj, kun la preskaŭ ne atendita rezulto, ke la tigro liberigis sian viktimon kaj forkuris. La virino estis grave vundita, sed ŝi resaniĝis.

Fama profesoro 60-jara

Profesoro Albert Einstein, nun el la plej famaj sciencistoj de nia tempo, fariĝis 60-jara. Oni legas ke li eltrovis novan klarigon pri la gravitado. La sekreto kuŝas en la kaŭzo de la gravitado kaj ĝiaj rilatoj al elektro, materio kaj magnetismo. Einstein opinias ke li estas survoje al la eltrovo de simpla formulo kiu klarigos la strukturon de la universo kaj ĉiujn sekretojn de materio kaj emanado.

Ĉu la golfa fluo estas pli varma ol antaŭe?

La lastaj vintroj estis eksterordinare mildaj en la nordaj regionoj (skribas s-ano O.T.N.); ankaŭ la nuna vintro estas tre milda. Ĉe kristnasko estis nek neĝo nek glacio sur la lagoj en la lando de la Norda Lumo. Pro tio la tagoj estis tre malhelaj, kiam la suno estis sub la horizonto. Se la neĝo kuŝas sur la tero, tiam oni povas legi gazeton dum du-tri horoj ĉiutage je kristnasko.

Montoj kun karboj ĉe la Suda Poluso

La amerika esploristo, admiralo Byrd, preparas novan ekspedicion al la Suda Poluso. Li esperas dum tiu okazo posedniri por Usono teritorion de unu milionoj da kvadrataj mejloj.

« Mi scias », li diris, « ke tie estas montoj kun karboj sufiĉantaj por longtempe provizi la bezonon de la mondo ».

Tamen, estas kalkulite ke, ankaŭ sen

la polusaj karboj, la karbprovizo en la tero sufiĉos por 3-4000 jaroj. Intertempe la scienco certe trovos plenvaloran anstataŭilon.

Nia afero

Precipa demando momente estas: Kio okazos pri Esperanto en la disrompitaĵ partoj de Ĉeĥo-Slovaka Respubliko? Ĉu ankaŭ tie niaj organizoj estos malpermesitaĵ? Tio ne estas certa; sed ni esperu ke tio ne okazos. Sed eĉ se ili restos, ilia aglibereco estos grave malhe'pata. Des pli energie devos labori niaj samideanĵoj en aliaj landoj, precipe en la demokratiaĵoj. Ni tamen venkos!

La manko de internacia interkomprenilo en nia epoko estas ridinda. Kongresoj kaj konferencoj kun tri-kvar-kvin oficialaj lingvoj estas sensecaĵo. Internacia trafiko, internacia turismo sen internacia lingvo fariĝas pli kaj pli paradoksaj. La ĝenerala enkondukiĝo de Esperanto estas nun ĉefe demando de tempo. Nenio povos ĝin haltigi.

Zigzagoo.

Ni funebras

— S-ro MAURICE DUCHOCHOIS, IEL-delegito en Gamaches, Francujo, mortis en la komenco de februaro. Li estis 76-jara, ano de la Komerca Ĉambro de Boulogne-sur-Mer kaj membro de la loka grupo. Li ripozu en paco!

— F-ino E. L. YOUNG, membro de IEL en Letchworth, Ang'ujo, mortis la 14-an de februaro. Ŝi havis 78 jarojn, kaj dum 20 jaroj prezidis la lokan grupon. Ŝi dormu pace!

Penso por la monato

Tial ni faru la Bonon, kiun fari estas nia devo, — ni interne scias tion, — kaj tiam iru antaŭen, fidante la Eternulon, kies subtenanta graco ebligas ĉion.

« Nur tiuj trovas la protektan zorgon de Dio, kiuj vivas danĝere. »

H. T. HAMBLIN.

Ŝtala kaj Betona Epoko en Arkitekturo

DE E. JULIAN WHITE, A. R. I. B. A.,

ĉartita arkitekto, IEL-fakdelegito por arkitekturo.

Dum ia nokto la trabaro kaj ĉirkaŭtubulaĵo, kiu kaŝis la konstruaĵon ĝis nun, esus formovita; nun la nova konstruaĵo malkaŝiĝis, kaj ĝia noveco formis elstaran kontraston kun la najbaraj domoj.

La impresio ne kontentigis min; sed de du personoj starantaj proksime mi aŭdis:

« Grandioza nova konstruaĵo! »

« Belega! »

Mi aŭskultis por aŭdi ion plian, sed ili ŝanĝis la temon.

Ci tiu interparolo klarigas bone la mankon de inteligenta intereso kiun multe da homoj elmontras rilate al nia civita arkitekturo. Kvankam la plimulto el ni pasigas sian tutan vivon meze de bonaj ekzemploj de arkitekturo, kiuj estas la rezulto de senlima zorgo kaj pensado de l'arkitekto kaj konstruisto, tamen la ordinara civitano ne provas ekzameni kaj estimi la arkitekturajn karakterizaĵojn, sed plej ofte li laŭdas nur la impreson novan kaj puran aspekton de ĉiu nova konstruaĵo. Ĉar ĉiu nova konstruaĵo donas ŝanĝitan aspekton al familiara strato, ĝi altiras la atenton, kaj opinioj estas esprimataj; sed komprenema estimo kaj inteligenta kritikemo mankas. Ofte estas ia sento de malkontenteco, eĉ kiam la unua impresio estas favora. Oni sentas ke la aspekto de la nova konstruaĵo ne estas kontentiga, sed la kaŭzojn por ĉi tiu ideo oni ne povas difini. Kaj tiel la intereso estas perdita.

La laiko eble rezonos ke arkitekturo estas la laboro de l'arkitekto, kaj li ne povas esperi havi ian ajn influon al la tendenco de arkitektura desegno per sia kritiko. Ci tiu ideo estas iom ĝusta, sed la efikeco de la publika opinio estas tiel forta ke ĝi povas fariĝi sentebla laŭ multe da manieroj. La arkitektoj estus devigitaj satigi la postulon je altnivela modelo de arkitekturo, se la publika opinio estus sufiĉe forta.

Arkitekturo trapasas nuntempe periodon de transiro, kaj estas ankoraŭ dubinde, ĉu la karaktero de la epoko estos

esprimata per la elveno de tute nova modo, aŭ ĉu ni plu devos toleri revivigon de antikvaj ideoj kaj figuraĵoj.

Tiu atendanta senĉeseco de la modoj de l'pasinteco en la arkitekturo devus memori ke ekzistas novaj statoj, kaj iai transira periodo estas necesa. Ci tiuj novaj statoj venis per la enkonduko de ŝtalo kaj betono — du novaj materialoj, kune uzataj.

Ĉiutage, kiam novaj konstruaĵoj estas konstruataj, ĉi tiuj materialoj estas uzataj, kaj ni vivas en la komenco de nova epoko: la Ŝtala kaj Betona Epoko. Ci tiu epoko estas ankoraŭ tiel juna ke ĝiaj rezultoj ne povas esti komprenataj en ilia ĝusta perspektivo. Post forpaso de pluaj kvindek aŭ cent jaroj, eble, oni povos ricevi ĝustan komprenon pri la karakterizaĵoj de la Ŝtala kaj Betona Epoko, kaj la laiko tiam povos estimi la desegnaĵojn de konstruaĵoj faritaj en la novaj materialoj.

Kritikado estas ĉiam malfacila, kaj se oni volas kritiki, oni devas kompreni la celon de l'arkitekto, la karakteron de l'materialoj kaj iloj, kaj la vidpunktojn de l'arkitekto kaj de la epoko. Estas tre malfacile por kritikuloj-samtempuloj, diskuti konstruaĵojn konstruitajn ne laŭ la ĝisdata kutimo. Estas malsaĝe, do, kondamni tiajn konstruaĵojn kvazaŭ malbonan arton. La venonta generacio eble estimos ilin kiel ion kutiman.

La ĝenerala tendenco hodiaŭa iras en la direkto al subtileco de formo, kaj forlaso de superflua ornamado. La formo kaj desegno de konstruaĵo nuntempe estas grandmezure regataj de ĝia funkciado. La fasadoj esprimas vereme la internajn planojn kaj celojn de l'konstruaĵoj, kaj tio estas sana tendenco. En la Resesanca Epoko, planoj ofte estis provizitaj pro la fasadoj, desegnitaj unue; tio ne estas sana tendenco en arkitekturo.

Ĝis la fino de l'antaŭa jarcento, brikoj aŭ ŝtono estis la materialoj ordinare

Vivu la homamo niataga !

Ni ricevis la jenan leteron kun peto pri publikigo, kiun ni volonte plenumas:

Antaŭ nelonge mi legis en via gazeto artikolon pri «Ago de homamo niataga». Supozeble interesos viajn legantojn ankaŭ la sekvanta epizodo kiu antaŭ kelkaj monatoj okazis sur nederlanda pasaĝera ŝipo en la Atlantika Oceano.

Tiu ŝipo transportis i. a. kelkajn judajn elmigrintojn al Okcidentindio. Troviĝis inter ili unu familio konsistanta el viro, virino kaj malsana knabino. La knabino estis antaŭ la elmigro kuracita de specialisto. Postlasante ĉion, la familio estis fuginta, kaj sur la ŝipo ili estis eble la plej malriĉaj kaj plej malfeliĉaj inter ĉiuj pasaĝeroj.

La gepatroj ne venis sur la ferdekon sed maldormadis ĉe la lito de la malsana filineto, kies malsano estis pligraviĝinta pro la trapasita mizero kaj la subita ĉeso de specialisto kuracado. La sindonemo de la gepatroj ne kapablis vivteni la infanon, kaj iumaten la etulino estis mortinta. La saman vesperon la kadavro estis ĵetota en la maron, ĉar la gepatroj ne posedis la necesan monon por teni ĝin ĉe si kaj poste entombigi ĝin ie sur la grundo.

Granda estis ilia malfeliĉo, kaj supermezura ilia doloro. Jen ie sur la vasta oceano ili devos postlasi sian amitan infanon en la malvarmaj ondoj !

Unu el la ŝipanoj kompatis la malfeliĉajn gepatrojn, kaj kun permeso de la ŝipestro oni faris kolekton inter la ŝipanoj por ricevi la monon necesan por aĉeti ĉerkon kaj pagi la kostojn de en-

uzitaj, sed nuntempe ni havas novajn materialojn, kaj tial ankaŭ novajn metodojn. Estas laŭnature ke ĉi tiuj novaj materialoj kaj metodoj devas stampi siajn individuecojn sur la konstruaĵojn, en kiuj ili estas uzataj.

Ni ne devas timi originalecon. Ni devas kompreni la epokon nuntempan, ĉar nova periodo de arkitektura aktiveco sekvas la dekadencan de l'pasinteco.

tombigo sur la grundo. Estis emocii vidi, kiel hejtistoj, maŝinistoj, kaj la ceteraj ŝipanoj oferis el sia malgranda havaĵo por tiu celo; kiel unu dolaro aldoniĝis al la alia, kaj fine estis kolektita sumo de 500 dolaroj.

Oni komprenu, ke nur la ŝipanoj inter si organizis kaj partoprenis la kolekton; la pasaĝeroj ne sciis pri ĝi. Tamen iamaniere kelkaj pasaĝeroj eksciis pri la afero, kaj tuj du bonhavuloj inter ili deklaris sin pretaj siakoste aranĝi ĉion. Sed tiu gesto forprenas nenion de la nobla intenco homama de l'krudaj ŝipanoj.

Inter la mallumeco de mizero kaj malfeliĉo hodiaŭaj, kaŭzitaĵoj de homoj al siaj propraj homfratoj, kiel signo montranta vojon al pli bela estonteco brile ellumas tiaj agoj. Kaj ili estas ne maloftaj. Tial: vivu la homamo niataga !

C. H.

Bona nomo

Eĉ se oni ne estas superstiĉa, oni fariĝas iom hezitema, legante la jenan ĉenon de rimarkindaj okazintaĵoj surmaraj :

La 5-an de decembro 1664 pereis la angla ŝipo « Menay » dum ventego sur la Ĉanelo. El 84 pasaĝeroj estis savita nur unu. Lia nomo estis HUGH WILLIAMS.

La 5-an de decembro 1785 surgrundiĝis skuno ĉe la insulo Man. El 60 viroj dronis 59. La savito nomiĝis HUGH WILLIAMS.

La 5-an de aŭgusto 1820 pasaĝera ŝipo kunpuŝiĝis kun ŝarĝoŝipo sur Tamizo. Sur la pasaĝera ŝipo troviĝis 25 plenkreskuloj kaj unu infano. Nur la infano estis savita. Ĝi nomiĝis HUGH WILLIAMS.

La 19-an de aŭgusto 1889 karboŝipo el Leeds suferis ŝippereon, ĉe kiu dronis naŭ personoj. Du saviĝis. Unu el ili estis la onklo de la alia, kaj ambaŭ havis la nomon — HUGH WILLIAMS.

(Trad. E.-lm.)

BONSANCO ĈE MALBONSANCO

Ofte oni aŭdas pri fatalaĵoj kaj akcidentoj, kiuj ĝenerale havas malfeliĉan finon. Nur escepte oni legas pri vere miraklaj hazardoj, dank' al kiuj certa morto estis evitebla.

En Richmond en Kalifornio dektri-jara knabo, Herbert Stanley, iun posttagmezon sin amuzis, igante paperdrakon leviĝi en la aeron. Hazarde la ŝnureto, ligita al la drako, fiksiĝis sur elektran kondukadon alttensian, pro kio ekestis rektkonjekto, tiel ke la kondukado disfandiĝis kaj unu fino de la drato ekfalas sur la straton. Jus antaŭe estis pluvinte, tiel ke la asfalto estis malseka, kaj la kondukdrato tordiĝis kaj serpentumis sur la glitiga tegaĵo eljetante pluvegon da fajreroj. Estis ne malpli ol 60.000 voltaj, kiuj tiamaniere ektuŝis la teron. La konduka drato prezentis plej sovaĝan dancon. Preteriranta sinjoro ekhavis sian pajlan ĉapelon ĉirkaŭvindita de la danca drato, tiel ke la ĉapelo ekbrulis sed feliĉe falis sur la straton. Cetere la koncerna viro restis sendifekta. En proksima sekundo la danĝera drato ekdancis plu laŭlonge de la dorso de hundo, kies haroj estis detranĉataj kvazaŭ per la plej akra razilo. Poste la drato ĵetiĝis tra la nefermita pordo de butikoj, en kiu staris sep klientoj, inter kies kruroj ĝi serpentumis, tamen ne tuŝante iun, post kio ĝi, en la posta sekundo, reelglitis. La sekva intertuŝo okazis kelkajn momentojn pli poste, kiam la kondukdrato je konsterna maniero ekfalas sur la metaltenilon de beboveturilo kun la rezulto, ke la tenilo ekfandiĝis. La posedantino de l'veturilo la sekundo antaŭe malkaptis la tenilon por prizorgi la etulon kaj iom rektigi ĝin. Finfine la konduka drato boriĝis en la asfaltan kun malagrabla sibla sono kaj tie ĝi fine ekkruŝis kviete. Ĉio ĉi prezentiĝis fulmrapide, kaj dum 'a mallonga tempo multajn homojn minacis certa morto. Se la drato nur hazarde estus ŝanĝinta sian direkton unu-du milimetrojn pli proksime al iu el la minacitoj, la akcidento tuj estus okazinta. Estis nura hazardo, ke ĉiuj elsavis sin sendifektaj.

★

En Meksiko-Centro okazis antaŭ kelkaj jaroj, ke la preĝeja planko diskrevis ĝuste kiam oni pie partoprenis la meson. Ĝi evidente ne eltenis la premegon de l' troŝarĝo. Simila okazaĵo estas konata el malgranda angla loko, Battenhead, kaj estis nura miraklo, ke neniu estis grave vundita.

La prezidanto de l' komunuma estraro, Fred Harrison, estis mortinta, kaj ĉe la enteriga ceremonio kolektiĝis preskaŭ la tuta vilaĝanaro en la preĝejo. Proksimume 250 homoj ĉeestis tie samtempe. Subite aŭdiĝis stranga krakado, kaj antaŭ ol la piaz aŭskultantoj havis tempon pripensi la kaŭzon, la planko ekmalleviĝis en la profundon. La tuta piularo en unu momento troviĝis profunde sube en la kelvolbo de l' preĝejo. Sed eĉ tie oni ne longe estis restanta. Proksiman sekundo ekkrakis refoje, kaj la « veturo » pluiris malsupren ĝis la t.n. katakomboj. Fininte definitive la vojaĝon, tiuloke oni baldaŭ aŭdis malagrablegan sonon de supre. Kun terura krakego la preĝejaj muroj disfalegis. Ekestis tondrego kaj krakado tute sen komparo. Ĝismorte timigite

Laŭ melodio amata :

BELA NOKTO

(Barkarolo-melodio de J. Offenbach, el « Rakontoj de Hoffmann ».)

Bela nokto, paradiza,

enrevigu nin,

Pri la tago sobre griza

forgesigu nin.

Lumu, steloj, mara rondo

respegulu vin,

Songe la murmura ondo

lulu, lulu nin.

Alportu la zefir'

havesojn ĉiela-flugile

Kaj en kisoj mil

dronu la korsopir'.

De la dioj la envio

ne disigu nin.

Donu, nokto, ke nenio

elrevigu nin, —

En feliĉego-ebrio

dronigu nin.

Karl VANSELOW

rapidegis la malmultaj vilaĝanoj, kiuj ne estis vizitintaj la preĝejon, al la loko de l'akcidento.

La tuta preĝejo estis aliformigita en unu solan nepriskribeblan ruinejon, kaj tute nature oni timis, ke terurega katastro okazis. La plej terura estis, ke oni ne perceptis ian sonon de la certe tre grave kripligitaj homoj, por ne menciĝi ĉiujn, kiuj tuj estis mortigitaj. La najbara vilaĝo estis alarmata, kaj baldaŭ la petita helpontaro estis sur la loko. La eifosa laboro povis komenciĝi. Oni estis tamen treege surprizita, kiam oni post pluraj horoj da intensa laboro atingis la katakombojn kaj tie retrovis la tutan diservanaron, kompreneble paralizitan de teruro sed ĝenerale nedifektitan. Se la tuta konstruaĵo ne estus tiel ĝistunde mankhava, ke unue cedis la planko, la preĝeja publiko sendube estus masakrita, kiam la muroj kaj la tegmento de l'preĝejo krakfalegis.

★

Antaŭ kelkaj jaroj du flugmaŝinoj kunpuŝiĝis je alto de ĉirkaŭ 700 metroj proksime de Zuriko. Estas kompreneble tre malofte ke du aeroplanoj kolizias, sed ĝenerale kolizio en la aero ĉiam signifas la morton. Tre malmultaj esceptoj konfirmas tiurilate nur la regulon.

Laŭ melodio amata :

AMA SALUTO

(Itala popol-melodio :

« E s' io fossi pesce, il mare passerei »).

*Se mi estus fiŝo,
min nenio tenus,
Naĝus mi tra-mare
kaj al vi mi venus.
Se mi birdo estus,
ho, por vin atingi
Tra la nuboj volus
fluge mi min ŝvingi.*

*Flugi aŭ tra-mare
naĝi mi ne povas
Kaj neniun vojon
vin revidi trovas.
Nur salutojn sendas
mi al vi por diri :
Mia kor' atendas,
ĝis mi ĉesos spiri.*

Karl VANSELOW.

La 13-an de novembro 1933 la piloto Thomas March direktis pasaĝeran aeroplanon, kiu kunportis sep pasaĝerojn, de Los Angeles al San Francisko. Samtempe kapitano Charles Oberrender direktis alian aeroplanon kun naŭ pasaĝeroj en kontraŭa direkto. Tiu tagon regis densega nebulo laŭ la koncerna aerostreko, kaj tiu nebulo kulpis, ke la preskaŭ nekomprenebla afero okazis: la aviadiloj kunpuŝiĝis je alto de mil metroj. La du maŝinoj enboriĝis unu en la alian kaj falegis kunigite altere. Ekzistis nenia dubo pri tio, ke la tuta aerveturantaro estas perdiĝonta. Sed kiam la maŝinoj sin trovis je alto de ĉirkaŭ cent metroj super la tero, subite ektrafis ilin fortega aerfluo, kiu malrapidigis la furiozan rapidigon, kaj pro tio la aeroplanoj alteriĝis per bela glitflugo. Eĉ ne unu el la pasaĝeroj estis vundita! La tuto vere estis fabeleca bonŝanco.

★

En 1934 okazis stranga akcidento en Albany en la ŝtato Nov-Jorko, Usono. Al negardata pasejo transfervoja la terkulturisto James Powers veturis en sia aŭto kune kun siaj edzino kaj tri infanoj. Powers ne rimarkis la alproksimiĝantan rapidvagonaron, sed hazarde direktis la aŭtomobilon rekte kontraŭ ĝin. La aŭto estis kurentenata iun distancon kaj poste jetegata for en formo de efektiva metalrubajo, kies partoj alteriĝis sur mil diversajn lokojn. Sed kio okazis al la pasaĝeroj kaj la veturiganto? Jes, la terkulturisto mem estis kapantaŭe enĵetita tra nefermita kupefenestro sur la genuojn de ĝismorte ektimigata sinjorino. Ankaŭ lia edzino ekjetigis kontraŭ la vagonaron. Sed ŝi flugis pli alten kaj falis sur la tegmenton, kaj ŝi havis tiom da spiritpreteco, ke ŝi ekprenis tubon por ventolado, al kiu ŝi albroĉigis. La tri infanoj konjekteble pro sia malpezeco estis ĵetitaj laŭ pli alta kurbo ol la du geedzoj, tiel ke ili flugis trans la vagonaron kaj falis sur herbejon transe, kie oni ilin retrovis relative bonstataj. Kelkajn horojn pli poste, kiam la gepatroj estis revenintaj post sia nevola forveturo kun la trajno, la familio feliĉe kaj en preskaŭ nedifektita stato estis unuiginta denove.

Tradukis E. Everholm.

MARGARET HOLDEN :

“ Lusitania Days ”

(Lusitania-Tagoj.)

La 7-an de majo 1915 pereis la angla pasaĝersipo « Lusitania » pro atako de germana submarboato.

Tio estis kiam, en Sankta Stefana Domo, en la vestejo, ni foje parolis pri la tagoj sekvintaj tiun tragedion.

Estis kvin knaboj Hauptmann. Tio signifas ke ni ofte vidis unu aŭ alian el ili. Ili perdis siajn vestaĵojn, kiam en iu frua matena horo ili rifuĝis en la domon de najbaro, kiun ne movis revenĝa sento pro la tre natura kolero kiun tiu krimo kaŭzis.

Ĉiuj kvin knaboj devis esti ekipataj per novaj botoj, kvin paroj tuj. La familio estis transloĝinta el nordokcidenta Londono al sudokcidenta, kaj ĝi poste venis por vestaĵoj kiujn ni estis promesintaj al Hermann, 14-jara, kaj Max, 9-jara. Sinjorino Hauptmann estis tre ekscitita pro ĉio kio estis okazinta, de kiam ni vidis ilin lastfoje.

Mi demandis pri la nova lernejo, kiel la knaboj ŝatas la ŝanĝon — ili ne estis feliĉaj en la antaŭa lernejo. Minaca silento sekvis, kaj tiam elverŝiĝis rakonto kiu povus ŝajni sentimentalaj kaj preskaŭ nekredebla.

Nun pasis de tiam jam tiel longa tempo, ke mi ne plu povas garantii pri la laŭvorta ĝusteco de mia rakonto; sed preskaŭ estis tiel. Mi rakontis ĝin jam plurfoje, kaj la afero impresis min tiom, ke ĝi estas neforgesebla.

Sinjorino Hauptmann diris : « La duan tagon la knaboj iris al la lernejo. Max atingis ĝin unue. Hermann vidis aron da knaboj sur la ludplaco kriegantaj kaj puŝantaj ion ĉirkaŭen, kaj li aliris por rigardi. Li diris ke li havis specon de timo ».

Hermann kapbalancis; lia rigardo ne estis forlasinta la vizaĝon de la patrino, dum ŝi parolis. Ŝi diris : « Vi rakontu, Hermann ! »

Mi povas nun ankoraŭ vidi tiun knabon, kiel li staris en la mezo de la ĉam-

bro, rigardante rekte, ĉe la bretoj plenaj de vestaĵoj; liaj brakoj pendis rekte kaj rigide. Li parolis en malrapida unu-tono, iutempe « stakate », kun folaj elrompiĝoj de pasio, kiam liaj vortoj ŝajnis parolaĵaj en majuskloj.

« Estis Max, kiun ili estis ĉirkaŭpuŝantaj, paŝante sur liaj piedoj, skrapante liajn botojn per la siaj — ili kriegaciis : Kial havas la Huno brilantajn novajn botojn ? — forprenu ilin for de li, li ŝtelis ilin — ŝtelaĵo, ŝtelaĵo, ŝtelaĵo ! — Mi provis alproksimiĝi sed ne povis — tiam ili surterigis lin kaj estis detirantaj liajn botojn, kiam la lernejestro venis — la knaboj ĉiuj haltis, kiam la estro diris : Kion signifas ĉi tio ? — kaj iuj el la knaboj diris : Ho, sinjoro, li estas Huno — lia patro estas en la malliberejo — la germanoj detranĉas la manojn de la infanoj... — Sufiĉas, diris la estro, vi estas unu el la novaj knaboj, — kiel li nomiĝas ? — Mi diris : Max ! — Kaj vi ? la estro demandis. — Mi diris : Hermann ! — Li diris : Venu, ĉiuj, dum ni enketos pri ĉi tio. — Tial ni ĉiuj eniris, kaj la estro kondukis Max'on sur la podiumon kie lia pupitro staris — kaj li metis Max'on antaŭen kaj ordonis al li stari tie. Mi ne scias, kie lia jako estis, kaj lia ĉemizo estis ŝirita — li aspektis kiel spektaklaĉo. Tiam la estro diris : Li aspektas mizeraja, ĉu ne ? — lia patro estas malamiko, ĉu ne ? — li estas en mallibereja tendejo kun aliaj el la lando kiun ni kontraŭbatalas. Ĉu prave ? — Jes, sinjoro, kriegis preskaŭ ĉiuj knaboj. — Guste, li diris; — levu la manojn ĉiuj knaboj kiuj pensas ke al Max kaj Hermann kaj fakte al ĉiuj germanoj oni devus trakte sentigi ke ili estas en malamika lando — vi aŭdas ke ĉiuj bonaj germanoj mortis, ke la resto estas plej multe spionoj — ke ili devas ĉiuj ekstermiĝi, radiko kaj branĉoj ! — Kaj tiam li haltis iom kaj diris : Levu la manojn ĉiuj knaboj kiuj intencas komprenigi al tiuj du knaboj ke ili estas en malamika

lando ! — Preskaŭ ĉiuj manoj leviĝis, ne ĉiuj — mi pensis ke Max falos malsupren : ho, fraŭlino, mi sentis terure — mi pensis, se la estro estas ankaŭ tia, kion ni devos fari ? »

La knabo haltis, eble por spiri, — mi estas certa ke ne estis por la efekto. Li parolis kvazaŭ deklamante lecionon.

« Kaj tiam, fraŭlino, subite la lernejo estro metis sian brakon ĉirkaŭ Max'on kaj tiris lin proksimen al si, kiel patrino faras kiam ni vundiĝis — kaj li diris tre laŭte unue : Knaboj, ĉu vi ne pensas ke estas sufiĉe malbone vivadi en malamika lando, kaj havi sian patron en mallibereja tendeĵo — kaj memoru ke, se germanoj estas malbonaj homoj, kiel vi diras, tamen ili estas BONAJ PATROJ kaj tre amas siajn infanojn — tiuj ĉi knaboj ne havas eĉ la komforton kiun la plej multaj el vi havas, kaj ilia patrino estas malfeliĉa kaj soleca kaj plej kredeble senespera pro la granda malamo ĉirkaŭ si kaj siaj infanoj. Ho, knaboj — tiam li silentis dum tempeto kaj poste diris : Levu la manojn ĉiuj knaboj kiuj penas helpi al ĉi tiuj knaboj, por ke ili ne estu tiel mizeraj en la malamika lando, — kiuj estos iliaj amikoj kaj helpos ilin kiom ili povos ? — Max ploradis kiel infaneto, ankaŭ mi : sed mi frotis miajn okulojn por vidi, kiuj knaboj levos siajn manojn — unu post alia supreniris, ne ĉiuj — sed la estro ne atentis pri tio : li nur diris per emfaza voĉo : BONE ! — nu, iru nun al viaj lokoj kaj daŭrigu en via laboro ! — Li puŝis nin en sian malgrandan ĉambroon kaj diris : Rekolektu vin mem, knaboj, kaj iru hejmen por la resto de la tago — kaj morgaŭ estos nova tago, esperu ni ! — kaj al Max li diris : Ne estu tro severa pri tiuj ĉi knaboj — ili nur faras tion, kion ili vidas aliajn personojn fari, kiuj devus scii pli bone — ni estas ŝafaro tamen, tial helpu la knabojn amikiĝi kun vi — nun elglitu el tiu pordo... »

Pluraj personoj estis venintaj al la pordo de la ĉambro, dum la knabo paroladis, sed li ne vidis ilin. Estis longa silento : tiam mi diris : « Kio okazis kiam vi reiris la sekvintan tagon ? »

« Ho, fraŭlino, ni estis pli proksime al la plorado, ol kiam ili turmentadis Max'on. Komence unu, kaj poste alia alproksimiĝis kaj diris : « Venu, Maĉjo, — kaj ŝovis pomojn kaj sukeraĵojn al ni, ĝis ni ne sciis kion fari. Ili daŭrigis estis amikaj, iuj el ili ne sed la aliaj zorgis pri ni ».

« Kaj tiu bonega viro, la estro, kio pri li, Hermann ? »

« Mi ne scias, fraŭlino. Mi supozas ke ĉio, kion ni povas fari, estas ne doni al li pli multan ĝenon, laŭ nia kapablo, — helpi, per lecionoj kaj aliaĵoj, — sed, fraŭlino, mi estas certa ke li scias, ke ni, Max kaj mi, « tie ĉi Hermann flustris tre time, » volonte farus ion ajn por li ».

El « The Friend »,

Tradukis S. Pugmire.

I A M

Iam vi vidis la mondon

Plena de suno ;

Vin certe ankaŭ revigis

Iam la luno ;

Iam vi kredis : facile,

Per propra forto,

Majstre forturni la batalojn

De ĉia sorto.

Sed : iam devos la steloj

Ja malaperi ;

Super vi iam vi devos

Majstrom toleri ;

Iam vi — paŝo post paŝo —

Pene vin tirus ;

Akomparanto obstina

Iam kurinos.

Tiam ne plendu, ke ĉesas

Via kapablo ;

Tiam ne vidu vin kuŝi

Iam sur la sablo ! —

Al junaj manoj konfidu

Mem la laboron,

Kaj per aklamo flamigu

Novan fervoron !

M. Strümpfel.

Anekdotoj

NE ESTAS KROKODILOJ...

Iu turista ĉe la marbordo de iu sudamerika ŝtato deziris sin bani en la maro. Sed, singarda, li demandis maljunan mariston, sidantan sur ŝtonego apud la maro: « Ĉu ne estas krokodiloj ĉi tie? »

« Neniu krokodilo », respondis la maristo.

La turista senvestigis sin kaj estis ironta en la akvon. Dume la maljuna maristo sur la ŝtonego tre atente observis lin.

« Diru, vi ja scias tutece ke ĉi tie ne estas krokodiloj? » demandis la turista ankoraŭ unu fojon, dum li estis enakviĝanta.

« Absolute neniu », rediris la maristo, « ilin ĉiujn forpelis la ŝarkoj ».

★

RUZA KAMPARANO

La vilaĝa kuracisto konsilis al kamparano, konsulti specialiston en la urbo, kaj iutage la kamparano faris tion.

En la atendejo de la fama profesoro jam sidis kelkaj pacientoj. Ankaŭ la kamparano ekŝidis kaj post nelonge demandis, kia estas la profesoro.

« Ho, bonega! Vi ne trovos alian, same bonan. »

« Ĉu li estas multekosta? »

« Sufiĉe. Dek frankojn por la unua konsulto, kaj po kvin por ĉiu sekvanta. »

La kamparano ekmeditis. Kelkajn momentojn poste, apenaŭ rimarkebla rideto pasis trans lian vizaĝon.

Kiam estis lia vico, li rapidis al la profesoro, kaptis ties manon, kaj skuis ĝin, dirante: « Jen, sinjoro profesoro, mi denove! »

★

PRUNTITAJ LIBROJ

Pri Victor de Kowa oni rakontas la jenon:

Foje li estis pruntedoninta al konato du volumojn el valora libroserio. Plurfoje ripetinte sed ankoraŭ ne ricevinte la librojn, li sendis al la konato la ceterajn volumojn de la serio, aldonante letereton, en kiu li skribis:

« Por ke almenaŭ unu el ni ambaŭ havu la kompletan serion, mi sendas al vi la ceterajn volumojn. »

La sekvintan tagon Victor de Kowa rehavis la kompletan serion.

RIDO SANIGAS

SINGARDA

Fremdulo (al turista): Kia belega perspektivo, kia grandioza panoramo, ĉu ne, sinjoro? Ĉu mi ne povos foje uzi vian lornon?

Turisto: Kun plezuro.

Fremdulo (detale rigardinte la tutan ĉirkaŭaĵon): Kaj nun donu al mi ankaŭ vian horloĝon kaj vian monujon! Mi volis unue konvinkigi, ĉu neniu ĝendarmoj estas proksime.

JUSTA PUNO

Du buboj trabatas sur la strato trian bubon. Preteriranto disigas ilin, demandante:

— Kial vi batas tiun ĉi knabon?

— Li faris malbonan taskon en la lernejo.

— Sed tio ne koncernas vin; tion devas aranĝi la instruisto.

— Jes; sed ni deskribis de li.

ARGUMENTOJ.

Viro estis edziĝinta al virino kiu en certaj momentoj similis pli al diablo ol al homo.

Iutage li venis al la polica komisaro plendante ke la kara edzineto batís lin per la karbŝovelilo sur la kapon.

La komisaro esploris la kapon de la viro kaj diris:

— Eble ne estis tiel grave. Mi ne trovas iun tuberon. Ne ekzistas do argumentoj!

— Ĉu ne argumentoj? ekkriis la viro. — Nu do rigardu foje ĉi tiun karbŝovelilon!

DISTRITE.

— Sed, edzo, kial vi jam enlitis la intanojn?

— Ĉar ili min ĝenis en mia laboro.

— Kaj ĉu ili volonte lasis sin senvestigi?

— Nu jes. Sole la etulaĉo en la angulo tie terure obstrukcis.

— La bubo kiu tiel singultas? Sed tio ja estas Friĉjo de la najbaro el la dua etaĝo!

ELTROVISTO.

— Kiu estas tiu ĉarma junulo, kiu loĝas ĉe vi?

— Ha, li estas grandega eltrovisto.

— Ĉu eltrovisto? Kion do li eltrovis?

— Ĉiumonate alian pretekston por prokrasti sian lupagon.

EN LA KLUBO DE L'ESPLORVOJAĜISTOJ

— Dekstre de mi leono, maldekstre — tigro, antaŭ mi — leopardo, post mi — ursoj...

— Ĉu tio estis en Centra Afriko!

— Ne, en la Zoologia Ĝardeno.

MISKOMPRENO

— Mi aŭdis ke la gefianĉeco de s-ro Ŝuldul kaj f-ino Nehavul rompiĝis pro miskompreno; ĉu vere?

— Jes: li pensis ke ŝi havas monon, kaj ŝi pensis ke li havas!


ENIGMA KONKURSO

Laŭ la peto de diversaj legantoj ni publikigas de nun ĉiunmonatan Enigman Konkurson, por kies prizorgado afable sin proponis s-ano P.H. Mooij. La premiojn por la konkurso disponigos la libroservoj de IEL kaj de « Heroldo de Esperanto ». Hodiaŭ ni prezentas por solvo unu krucvort-enigmon kaj unu silab-enigmon. Solvojn alvenu ĝis la 30-a de aprilo al: S-ro P. H. Mooij, Rue Defacqz, 78, Bruselo, St. Gilles, Belgujo. — Eventualaj demandoj pri la enigmoj nur povos esti respondataj, se respondkuponon estos aldonita.

Por la ĝusta solvo de ĉi tiuj enigmoj ni fiksis la jenajn premiojn: 1. Kataluna Antologio; 2. Akbar (romano); 3. Veterano (de I. Gomes Braga). Pri la atribuo de la premioj al la solvintoj decidis la loto. La solvojn de la enigmoj kaj la nomojn de la premioj ni publikigos post proksimume du monatoj.

KRUCVORT-ENIGMO

Jen la signifo de la vortoj serĉotaj; la litero « r » inter krampoj (r) signifas, ke oni devas preni nur la radikon de la koncerna vorto.



Horizontale (de maldekstre dekstren): 1. arda senbrida amo; 6. konjunkcio; 10. inklina al mal-severeco; 11. ĝerminta sekigita herdeo, uzata por fari bieron; 13. jugoslava monunuo (r); 15. prefikso; 16. skrapi per speciala ilo substanco, ne tre malmolan, por ĝin dispecetigi; 19. varmega (r); 20. pastra blanka tola mestvesto ĝispieda; 22. baseno por ripari ŝipojn; 23. malgranda familiano; 24. tranĉe; 25. kurba homa ostoj; 26. denove doni signalon por anonci danĝeron (r); 27. formoviĝi levige kaj mallevige; 29. eŭropa ĉefurbo; 32. prepozicio; 33. simila al bonodora floro el bulbvegetaĵo; 36. ŝirmejo, ripozejo (r); 37. pozitiva elektrodo de pilo; 39. mezuro; 41. akcesoraĵo por ornamo; 42. konjunkcio kaj sufikso (do du vortoj); 43. stato de l'orpa senaktiveco.

Vertikale (desupre malsupren): 1. montranta luksan belecon; 2. parto de vorto (r); 3. particip-sufikso; 4. impresi la flarsenton (r); 5. aro el ĉiuj kunlernantoj (r); 6. enuigi; 7. kore ŝati; 8. ĉiela nutraĵo; 9. direkto (kardinala punkto); 12. gaja burleskulo (akuzative); 14. insularo (r); 17. aĉeti kiel eble plej multe da varoj por uzuri per ili; 18. pretigi; 21. fordoni multvalorajn; 22. kiel 43 horizontale; 27. juvelŝtono; 28. administristoj similitan al apoteko; 30. produkti sonojn (r); 31. densigita stato de oksigeno; 33. angla titolo (r); 34. malkompetentulo (r); 35. nerekte paroli pri io (r); 28. eŭropano (r); 40. metalo.

SILAB-ENIGMO

a — al — ar — ar — ar — ci — do — do — ek — fal — fe — ge — go — gra — gu — ha — hi — ka — ka — ke — ko — ko — ko — ko — ko — kon — kra — kri — le — lo — lo — lu ma — mar — mar — me — men — men — mo — na — ne — ni — no — no — no — no — o — o — o — o — o — o — o — pa — pen — po — pro — ri — ri — ri — ri — ri — rin — ro — ro — se — si — so — spon — ta — ta — te — te — te — ti — to — to — to — tri — va — vi — vi — vi — vi — vu — zan zer — zo.

El supraj 87 silaboj formu 23 vortojn, kies sesaj literoj, legataj de supre malsupren formas la nomon de konata esperantista asocio. Por plifaciligi la divenadon ankaŭ al ne jam tre spertaj solvemuloj, ni donas jen ankaŭ la (iom fantazian) vicon de la komencliteroj:

lmkagkakeashpmakavgkmvhp.

Jen la signifo de la vortoj:

1. antaŭnomo; 2. korp parto; 3. vestaĵo; 4. kruvilo; 5. desegni; 6. floro; 7. funebra podio; 8. lertigi; 9. veneno; 10. meminciatia; 11. supozo; 12. instruisto; 13. sukeraĵo; 14. kanonaro; 15. militakiri; 16. kalendaro; 17. muzikilo; 18. scienco; 19. trairejo; 20. batilo; 21. vicparokestro; 22. marfiŝo; 23. loĝejo.

Internacia Esperanto-Ligo

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, (Hets.), Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 109. 22an de Februaro, 1939.
NOVA ĈEFDELEGITO.

Finnlando

S-ro Joel Vilkki, Somero, Finnlando.
NOVAJ DELEGITOJ.

Brazilo

Belo Horiz. nte. FD (Hemio) : W. Veado, Rua Uberlândia 290.
Porto Alegre. FD (Fervojoj) : A. Zamora, Rua Santos Pedroso 207.
Rio de Janeiro. FD (Bankaj aferoj) : F-ino I. Baggi de Araujo, Rua Julio de Castilhos 61 c IV.
FD (Gimnastiko) : A. J. Vaz, Rua Paraná 41.

Britujo

Birmingham. FD (Asekuro) : K. Lawrence, 7, Acheson Road, Hall Green, Birmingham 28.
Cowes. (Insulo Wight). D : L. A. Cass, 20, Bond Cottages, Albert St., West Cowes.

Ĉeĥo-Slovakujo

Povazská Bystřica. D : Fr. Černý, Nádražní 568.
Praha. FD (Tajloro) : A. Slanina, Nádražní 25, Praha XVI.

Danujo

Gesten. FD (« Unua flegado ») : H. Mathiesen, « Estersminde ».
Herning. VD : F-ino S. Sørensen, Bredgade 53.
Ringkøbing. D : S. Hvid, Vester Strandgade 16.
Vejen. D : E. Schlünssen, Fr. d. VII gade 15.

Finnlando.

Oulu. D : Y. Kuorikoski, Tuiran Veistokoulu.

Francoj

Dunkerque (Nord). FD (Gazetaro kaj Radio) : E. Houzé, 121 Gaspard Neuts, Malo cê Dunkerque.

Norvegujo

Odda. D : F-ino K. Hvidsten, Eitrheimsveien 103.
VD : K. Weka, Roldal - Haukelidveien 94.

Polujo

Torun. FD (Optiko kaj Filatelio) : M. Grodzki, Chelminska 5.

Portugalujo

Castro Verde. D : J. Afonso Martins.
Lisboa. FD (Lingvaj aferoj) : M. Oliveira, Caires, Rua do Salitre 139-1.
Torrao. D : F-ino G. da Conceição Parreira.

Svisujo

Aarburg. D : Heinrich Nägeli, im Heimeli.
FD (Komerco) : La D.
Basel. VD : F-ino J. Righetti, Amerbachstrasse 87.
Olten. VD : E. Kissling, Wil bei Olten.
FD (Komerco) : La VD.

ŜANGOJ.

Grekujo

Athenai. Nova D : K. Freca, odos Finikis 4a.

Polujo

Cieszyn. VD : Prof. R. Kubalok, Pokoju 2.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

Bonvolis aliĝi kiel Membro-Subtenantoj :
54. S-ro T. L. Enderby, Wellington, N.S.W., Aŭstralio.
55. S-ro W. T. Gayfer, Cleethorpes, Anglujo.
56. S-ro J. L. Mackenzie, Newport (I.O.W.), Anglujo.

FAKA ASOCIO.

Interkonsento pri kunlaboro, laŭ par. 13 de la Statuto, estas farita kun :
Internacia Societo de l' Esperantistaj Juristoj.
Kotizoj de Fakaj Asocioj, kun kiuj I.E.L. havas Interkonsentojn, povas esti pagataj pere de la Ĉefdelegitoj kaj Perantoj de I.E.L. Plena informo troviĝos en la aperonta Jarlibro.

Cecil C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

★

OFICIALA INFORMILO

N-ro 110. 1an de Marto 1939.
NOVAJ DELEGITOJ.

Brazilo

Alagoinhas. D : C. de Souza Cunha, Rua 24 de Outubro, 12.
Fortaleza. VD : J. M. Othon Sidou, Rua Barao do Rio Branco 1330.
FD (Katolikaj aferoj) : F-ino M. Stael Porto, Bemfica 2457.
FD (Latina Lingvo) : Prof. E. Araujo, Rua General Sampaio 1085.
Recife. FD (Bankaj aferoj) : A. Velloso, Caixa Postal No. 215, Banco Auxiliar do Comércio.
Rio de Janeiro. FD (Farmacio) : A. Caetano Coutinho, Rua Ana Barbosa 48, Meyer.

Britujo

Monkseaton (Northumberland). D : F-ino A. L. Richardson, 9 Osborne Gardens.

Ĉeĥo-Slovakujo

Lázně Poděbrady. D : J. Hanuš, Lázně Poděbrady 421/III.

Francujo

Coudekerque-Branche (Nord). D : S-ino L. Vanhersecke, 11 Rue Molière.

Malo-les-Bains. VD : G. Pieters, 52, Place de l'Hôtel de Ville.

Nancy. FD (Instruado) : Prof. E. Schmitt, 40 Rue de Mon-Désert.

St. Pol sur Mer (Nord). D : M. Birembaux, Ecole Jaurès, Rue Gittenger.

Hungarujo

Lakközség. D : D-ro F. Kovács, Lakközség, körorvos.
FD (Medicino) : La D.

Jugo-lavujo

Beograd. FD (Ŝakludo) : O. Avsec, Karađordjeva ul. 59.

Zagreb. FD (Ĥemio) : J. Prodanovič, Primorska 26.

Latvujo

Kandava. D : Karlis Foss, « Licišos », stacija Kandava.

Norvegujo

Narvik. D : O. L. Eriksen, Magnus Bergsgt. 14.

Porsgrunn. D : H. S. Jenssen, Kjolnesgaten 15.
VD : Henry Lauridsen, Heroya pr. Porsgrunn.

Sauda. D : Robert Dyhre, Sauda en Ryfylke.

Nov-Zelando

Gisborne. D : J. F. Holloway, Earl's Camp.

Palmerston. D : H. E. Facer, 142 Victoria Avenue, Palmerston North.

Wellington. FD (Fervojoj) : W. A. Kerr, c/o Signal & Electrical Engineer, Railways, Wellington.

Portugalujo

Barreiro. FD (Maraj sportoj) : A. Bravo Marinho, Rua Miguel Pais, 76.

FD (Tursimo) : L. Ferreira da Silva, Avenida da República 54.

Lisboa. FD (Lignoskulptado) : L. Augusto da Cruz, Travessa Henrique Cardoso 91, porta 2 D.

Pombal. D : Manoel Joaquim Braz.

Svedujo

Nässjö. FD (Komerco kaj industrio) : M. Fejde, Radhusgatan 40 A.

Svensbro-Borgunda. D : Einar Storm, Borgunda, poŝto Skultorp.

Usono

Oklahoma City. D : S. N. Bunch, 3617 N. W. 12th. Street.

ŜANĜOJ.**Francujo**

Boulogne-Billancourt (Seine) : D : G. Grunberg-Lebrun, 98, Rue Gallièni.

Polujo

Cieszyn. D : L. Krysta, ul Pilsudskiego 12, Cieszyn 2.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

Bonvolis aliĝi kiel Membro-Subtenantoj :

57. S-ro E. L. Clarke, Winter Park, Usono.

58. S-ro E. Dodge, Washington, Usono.

59. S-ro J. A. Forssell, White Bear Lake, Usono.

60. S-ino D. M. Worcester, London, Anglujo.

MONATA STATISTIKO**Membraro.**

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Februaro, kaj ankaŭ, por komparo, ĝis la fino de Februaro 1938 :

	Feb. 1938	Feb. 1939
Asociaj Membroj ...	1843	2256
Individuaj membroj :		
MJ	510	648
MA	580	640
MAH	227	311
MS	102	59
Patronoj	4	13
DM	72	71
HM	29	30
	— 1524	— 1772
	3367	4028

Korespondadoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Februaro 1939 :

Ricevitaj 679
Senditaj 680

1359

Cecil C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

Unueco estas Forto

OFICIALA INFORMILO

N-ro 111.

San de Marto, 1939.

NOVAJ DELEGITOJ.**Belgujo**

Bruxelles. FD (Juro) : J. Robert, advokato ĉe la Apelacia Kortumo, 87, Rue Washington.

Francujo

Boulogne-sur-mer (Pas-de-Calais). D : J. Dupont, 64 Rue Faïdherbe.

Hagenau (Bas-Rhin). FD (Katolikaj aferoj) : P. Bohn, Rue des Moines 4.

Reichshoffen-Ville (Bas-Rhin). D : C. Mull, 19, Rue de Guinbrechtshoffen.

Soufflenheim (Bas-Rhin). D : S-ino M. Hoernel, Rue du Marché 16.

Grekujo

Kavalla. VD : F-ino T. N. Spaghathorou, Odos Artemidos 8 A.

Norvegujo

Horten. D : S. Karlsen, Wisbech str. 2.

Nov-Zelando

Wellington. FD (Fotografado) : M. Carver, c/o Kodak N.Z. Ltd., 292, Lambton Quay. FD (Skoltismo) : M. G. Maehl, 8-10 Brandon St., Wellington, C. 1.

Polujo

Warszawa. FD (Instruado) : B. Gluchowski, sw. Wincentego 80, Warszawa 24.

Svedujo

Kristianstad. VD : T. Levin, Box 172.

Lidköping. D : S. Palm, N. Tornatan 8.

Nässjö. D : O. H. Andersson, Sörängsvägen 39.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

Bonvolis aliĝi kiel Membro-Subtenantoj :

61. S-ro E. Jacques, La Louvière, Belgujo.

62. S-ro A. Martin, Macon, Francujo.

63. S-ro H. W. Smith, Watford, Anglujo.

64. S-ino F. Staes-Van de Voerde, Bruxelles, Belgujo.

65. S-ro A. de Vries, Soest, Nederlando.

Cecil C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

★

OFICIALA INFORMILO

N-ro 112.

15an de Marto, 1939.

NOVAJ DELEGITOJ.**Belgujo**

Bruxelles. D : H. Castel, 434, Avenue de Jette, Ganshoren-Bruxelles.

Finnlando

Kullaa. D : T. M. Aurela, Kullaa, Levanpelto.

Hungarujo

Bánokszentgyörgy. D : E. Wallenstein, Bánokszentgyörgy (Zala m.).

Kalocsa. VD : F-ino I. Bodor, Csap utca 16.

Zalaegerszeg. D : Sándor Eitner, Salomvár (Zala m.).

Jugoslavujo

Fuzine. D : M. Zima, Dolnje selo 166, Gorski-kotar.

Kanado

Ste. Anne de Bellevue (Quebec). D : J. V. Lawson, 1 Kent Avenue.

Maroko

Khemissét. D : A. Bienvenu, Rue Docteur Beaufeuil.

Svedujo

Hällekis. D : G. Carlsson, Ledsängen, Hällekis.

Usono

Akron (Ohio). D : F. Stancliff, 1106 Big Falls Avenue.

Cecil C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

★

**Internacia Konkurso
1939**

STATO JE LA 28a DE FEBRUARO, 1939.

Poentoj

	Elibazo	1939	0/0
1. Portugalujo ...	303	549	181.1
2. Finnlando	250	347	138.8
3. Jugoslavujo ...	694	783	114.3
4. Brazilo	429	436	101.6
5. Danujo	1038	847	81.6
6. Aŭstralio	489	391	80.0
7. Britujo	6594	5201	78.8
8. Hungarujo	574	452	78.7
9. Svisujo	693	520	75.0
10. Polujo	683	447	65.4
11. Argentino	309	187	60.5
12. Belgujo	1747	972	55.6
13. Usono	1597	837	52.4
14. Grekujo	250	115	46.0
15. Hispanujo	885	419	45.1
16. Italujo	561	246	43.8
17. Nederlando ...	3253	1390	42.7
18. Japanujo	517	212	41.0
19. Svedujo	3215	1216	37.8
20. Norvegujo	1060	378	37.2
21. Francujo	5503	2017	36.6
22. Nov-Zelando ...	444	152	34.2
23. Ĉeĥo-Slovakujo.	930	256	27.5
24. Bulgarujo	451	35	7.7

Oni Anoncas

Naskiĝo. La 23.2. naskiĝis nia filineto : Romana-Berber. J. de Vries kaj D. de Vries-Suwijn, Achter de Hoven 123, **Leeuwarden**, Nederlando. — Ni kore gratulas!

Gefianĉiĝo Højmark-Nielsen. Gefianĉiĝis f-ino Betty Højmark, fervora samideanino en **Rudkøbing**, Danlando, kaj s-ro Richard G. Nielsen en **Nykøbing F.**, propagand- kaj etudestro de la dana Esperanto-movado. — Koran gratulon!

Geedziĝo Moen-Molenaar. La 22.3. geedziĝos s-ro Piet Moen, estrarano de LEEN-sekcio **Den Haag**, Nederlando, kaj f-ino Tini Molenaar, membrino de la sama grupo. — Plej koran gratulon!

Letervespero 13 aprilo. Nysted Esperanto-klubo, **Nysted**, Danlando. — Se estas tro multekosta vojaĝo, — vi ĝin anstataŭigu per la skribajo; — se vi amikinin serĉadis ĉie, — ŝin eble vi trovos ĝuste ĉi tie. — Do uzu la bonan okazon : — Skribu amase kaj skribu amason! — Bonvolu sendi viajn leterojn al : D-ro A. Thyssen, **Nysted**, Danlando. (583)

Jen atentu! Letervesperon aranĝos la Esperanto-klubo en Tibro meze de aprilo. Tuj sendu poŝtkartojn kaj leterojn al : Tibro Esperantoklubb, Ingemar Svensson, IEL-delegito, Box 53, **Tibro**, Svedujo.

Letervespero okazos en Esbjerg Esperanto-Klubo la 20 aprilo. Skribu multnombre al : Thomäsen, Skjoldsgade 5, **Esbjerg**, Danujo.

Letervespero 3 majo. Societo Esperantista « Verda Stelo », Colmar, aranĝos letervesperon kiel propagandilon. Sendu multnombre leterojn kaj poŝtkartojn al : Emile Zimmermann, 10 rue des Abeilles, **Colmar** (Haut-Rhin), Francujo, Respondo garantiata. (588)

Letervespero, okaze de nia 12 ½-jara klub-jubileo. Bonvolu skribi multnombre el ĉiuj landoj kaj kontinentoj **antaŭ** la 18-a de majo 1939. Ni certe respondos al ĉiuj. Adreso : J. Dercks, Antwerpschestr. 43, **Bergen-op-Zoom**, Nederlando.

Atenton! Grupo de komencantoj deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj ilustritaj kaj leteroj. Adreso : S-ino Saga Thorén, Box 15, **Ulvåker**, Svedujo.

Inter anglaj geskoltoj helpu propagandi, sendante amase salut-kartojn, vialandajn **skolt-gazetojn**, Esperanto-gazetojn, afiŝojn, broŝurojn, fotojn ktp. por ekspozicia uzado (22 aprilo) kaj venont-somere ĉe konstantaj tendarejoj. — Adreso : Geskoltoj de Stafford, per Pastro E. N. Thomas, 18, Title Barn Road, **Stafford**, Anglujo.

40 gelernantoj el Loveno atendas korespondantojn per poŝtkartoj. Respondo garantiata. Adreso : S-ro Van den Eynde Jos., Dorpsplaats, **Betekom** (B't), Belgujo.

Novaj geesperantistoj, ĉe : Joŝitaka Ueda, Boujōŝijcū-Kita, **Kioto**, Japanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Garantias respondon.

Gesamideanoj, sendu fotojn por 3-a eldono de albumeto! Ĉiu sendinto ricevos senpage multajn fotojn kun adresoj. — Fot. A. Indrulis, Laizuva, Litovio.

Kun junul'noj deziras korespondi 5 svedaj junuloj 15-19 jaraj (komencantoj), per adreso : Karl Alvar Persson, Box 1537, **Kumla**, Svedujo.

Deziras korespondi denove kun malnovaj kaj novaj amikoj. Politiko, interŝanĝo de jurnaj, ilustritaj gazetoj. Respondos al ĉiu almenaŭ unufoje. S-ro Charles Neat, 32, Oakland Avenue, Stockton Lane, **York**, Anglujo.

10 gekomencantoj finantaj la kurson deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondos certe al ĉiuj. Skribu unue al instruinto : Stjepan Gregurec, Kosirnikova 29, **Zagreb**, Jugoslavio.

Deziras korespondi kun samfakuloj en ĉiuj landoj kaj kun gesamideanoj en malproksimaj landoj : Oficisto en vivasekura asocio, T. Aardestrup, del. de IEL, « Fremtiden », **Aalborg**, Danujo.

Dudek komencantoj deziras korespondi kun gesamideanoj sur la tuta tero. Skribu al : Instruisto Jørgen Andersen, Toldbodgade 16, **Silkeborg**, Danujo.

Poŝtmarkojn interŝanĝas kun seriozaj filatelistoj. Por 500-5000 ĉiam sendos saman kvanton aŭ samvalorajn laŭ Michel. Sendu al : Z. Székely, **Pestszentlőrincz**, Kossuth u., Hungarujo. (Delegito de IEL.) (567)

Por siaj 75 **gelernantoj** serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo s-ro T. Blokland, 't Zand (N. H.), Nederlando, kiu transdonos la ricevitajn korespondadojn.

20 Cseh-kursanoj de T. Morariu deziras korespondi kun komencantoj. Adreso : Gunnar Björck, Gustavsg. 21, **Orebro**, Svedlando.

25 gekursanoj de daŭriga kurso deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata. Adreso : S-ro Chr. Lundgaard, Nórregade 5, **Auning (Djursland)**, Danujo.

Junia samideano deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata. Adreso : Richard Nielsen, Torvet 7, **Ebeltoft (Djursland)**, Danujo.

Hungara kuracisto deziras korespondi kun kleraj finnoj kaj estonoj. D-ro Kovacs Ferenc kórörvos, Lak, Hungarlando, Borsódmegey. (Del. de IEL.)

Poŝtmarkojn el ĉiuj landoj interŝanĝas (bagatelojn ne), certe respondos : I. Farkas, **Budapest**, XIV. Hungaria-kórut 170-172. Interesiĝas pri infandeseĝnaĵoj.

Salikidoj, ĉirkaŭ 200, deziras post 60-80 hora Cseh-kurso korespondi. Bonvolu sendi proponajn leterojn al : Weide, **Ringkóbing**, Danlando.

Arca B. Lió, Bistrica 7, **Pazarĝik**, Bulgarujo, deziras korespondi. Temoj diversaj. Interŝanĝas poŝtmarkojn, revuojn k. a.

Usono — Rex Booth, 311-N. 3rd Street, **Clin-ton (Missouri)**, deziras interŝanĝi leterojn, potkartojn ilustritajn, fotojn.

Deziras korespondi kun ĉiulandaj fraŭlinoj pri lingvo, literaturo kaj aliaj temoj : D-ro Spindler, **Toul (Meurthe-et-Moselle)**, Francujo.

Korespondado : 12 gekursanoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Bonvolu unue skribi al : G. A. Fritzell, St. J. 9 E, **Hal'sberg**, Svedujo. Respondo garantiata.

Tajloro deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj kaj leteroj. Bonvolu skribi al : S-ro Oscar Bengtsson, Box 300, **Insjón**, Svedujo.

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj kaj leteroj. S-ro Hugo Olsson, Fack 19, **Deje**, Svedujo.

Filatelisto deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, laŭkvante, kun ĉiuj landoj. Sendu 50-100 al : S-ro Gösta Eriksson, Box 600, **Tierp**, Svedujo.

Pri ĉiuj temoj, letere, kun gesamideanoj de la tuta mondo volas korespondi s-ro Ant. Slanina, Nádražní 25, **Praha XVI**, Ĉeĥo-Slovakio.

Ĉeĥo-slovaka filatelisto deziras interŝanĝi poŝtmarkojn (50-100 politere), resp. neuzitajn ĉsl. poŝtmarkojn. — S-ro Ludvik Kodym, **Nádražní 78, Praha XVI**, Ĉeĥo-Slovakio.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn de ĉiuj landoj laŭ Michel, aŭ peco por peco. Nepre respondos. S-ro O. Holmberg, Box 2637, **Hofors**, Svedujo.

Miaj junaj gelernantoj 16-24 jaraĵoj deziras korespondadon. Mi mem, 28 jara, dana instruisto, ankaŭ deziras gekorespondantojn en Francujo, Polujo, Ĉeĥoslovakio, Estonio kaj Norvegujo-Svedujo. — Einar Greve, Nr. Lyndelse, **Aarslev**, Danlando.

Junia svedo deziras korespondi kun gefraŭloj en aliaj landoj. Bonvolu skribi al : S-ro Bertil Larsson, Sjögatan 46, **Mönsterås**, Svedujo.

Sveda 27-jara pianistino deziras korespondi. F-ino Dorkas Norre, Uppsalagatan 9, IV, **Stockholm**, Svedujo.

Tri gajaj flandraj junuloj deziras korespondi, nur kun fraŭlinoj, pri ĉiu gaja temo. Adreso de nia Prezidanto : Albert Lavrijsen, Vrijheid 101, **Arendonk**, Belgujo.

Filatelistoj! S-ino Fink, 5 Brazza, **Cassablanca**, Maroko, interŝanĝas poŝtmarkojn kun seriozaj filatelistoj, laŭ Yvert. Malakceptas bagatelojn. Afranku per novaĵoj filatele!

Kun japanaj geĉinoroj en Eŭropo deziras korespondi gimnazia eks-profesoro F. Dyba, Moorweg 82, **Berlin-Tegel**, Germanujo.

Pri popolkutimoj (moroj) deziras korespondi letere kun ĉiuj landoj D-ro Karlo Mezei, **Budapest VII.**, Vilma Király-nö-ut 11.a, Hungarujo.

Dudeko da lernantinoj volas korespondi per poŝtkartoj por perfektigo. Skribu plejmulte! Respondo akurata. Adreso : Esperanta Kurso, Escola Normal, **Alagoinhas**, Bahia, Brazilo. (Gratuloj al la direktoro de « Escola Normal »). Dir. Prof. A. Camargo, efikus bonege.)

La Senlingvulo

FAMA ROMANO DE KOROLENKO

tradukita de Maria Sidlóvskaja

NUR POR ANTAŬMENDONTOJ!

Ni presigos por vendado ne pli multe da ekzempleroj ol estos antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj. Do, kiu deziras posedi tiun ĉi libron, tiu devos nepre antaŭmendi kaj antaŭpagi ĝin. Kiu ne antaŭmendos kaj antaŭpagos, tiu poste ne povos aĉeti ĝin.

« La Senlingvulo » ampleksos proksimume 240 paĝojn (ordinara libroformato), estos presita sur senligna papero, kaj bindita. La antaŭmenda prezo estas guld. 2.50, plus 0.25 por sendkostoj; por profesiaj revendistoj kaj libroservoj 1.75, plus 0.25. Se venos minimume 500 antaŭmendoj, ni donos al ĉiu antaŭmendinto (ankaŭ al revendistoj kaj libroservoj) kompencon en valoro de 0.50 gld, por ĉiu antaŭpagita ekzemplero.

Ĉiu samideano (ne-revendisto), kiu varbos tri antaŭmendontojn, ricevos sian propran (kvaran) ekzempleron senpage.

∴ HEROLDO DE ESPERANTO ∴

Harstenhoekweg 223, SCHEVENINGEN, Nederlando

La libro estas mendebla ankaŭ ĉe Int. Esperanto-Ligo

